

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj

#### de la aktuala numero:

Renato Corsetti

Federico Gobbo

Mireille Grosjean

Anatoli Ionesov

Wim Jansen

Dennis Keefe

Rudi Koot

Zsófia Kóródy

Ilona Koutny

Katalin Kováts

Stefan MacGill

Radojica Petrović

Raita Pyhälä

Amri Wandel

Wang Minhao



---

## ENHAVO

---

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i> .....	3
Zsófia KÓRÓDY: <i>Instrukapabligo, modula trejnado</i> .....	4
Stefan MACGILL: <i>Strategio por edukado – kun rimedoj</i> .....	9
Dennis KEEFE: <i>Esperanto-Insulo I [...]</i> .....	12
Federico GOBBO: <i>Filozofio kaj historio de informadiko per E-o</i> .....	17
Renato CORSETTI: <i>Ni instruu la veran E-on kaj ni instruu ĝin facila</i> .....	19
Wim JANSEN: <i>Pri kelkaj malfacilaĵoj en Esperanto</i> .....	25
Rudi KOOT: <i>Miaj spertoj pri lingvoj</i> .....	31
<i>Libro-recenzo (Wagemaker: La Multiplika Ĉapelo) (smg)</i> .....	32
<i>Instruante en Afriko II. (Mirejo GROSJEAN)</i> .....	33
<i>El la landoj kaj sekcioj (CN, FI, FR)</i> .....	35
<i>Novaĵoj de edukado.net (Katalin KOVÁTS)</i> .....	37
<i>Forpasoj (nekrologoj pri J. Šemer, O. Haszpra, E. S. Perevertajlo)</i> .....	38
<i>Informoj pri ILEI</i> .....	41

---

## ESTRARO DE LA LIGO

---

**Prezidanto:** Stefan MACGILL, Pannónia u. 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.

Tel. (+36 1) 349-5207, <[stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>. Kunordigo, eksteraj rilatoj, regularoj, partneroj, ‘esperanto125’, *Juna amiko*

**Vicprez.:** Duncan CHARTERS, PO Box 100, Elsah, Illinois 62028-0100, Usono.

Tel. (+1) 618 3745252, fakso: (+1) 618 3745465, <[duncan.charters@gmail.com](mailto:duncan.charters@gmail.com)>. Universitata kaj scienca agado/komisiono, instru-teknologia evoluo.

**Sekretario:** HUANG Yinbao (Trezoro), Jingchuan-Xian, Esperanto-box 16800#, Pingliang, Gansu, CN-744300, Ĉinio. Tel. (+86) 18893316800, <[ilei.sekretario@gmail.com](mailto:ilei.sekretario@gmail.com)>, por membro-administrado: <[ilei.oficejo@gmail.com](mailto:ilei.oficejo@gmail.com)>.

**Estrarano pri financoj:** Julija BATRAKOVA, Rusio/Hago, Nederlando.

Tel. (+31) 252 515331, <[persiko@mail.ru](mailto:persiko@mail.ru)>. Financaj kaj kasistaj aferoj.

**Estrarano:** Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412

Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983,

<[zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de)>. E-centroj, instrukapabligado, ekzamenoj.

**Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobođenja 36/14, RS-32000 Čačak,

Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <[radojica.petrovic.rs@gmail.com](mailto:radojica.petrovic.rs@gmail.com)>. Edukprojektoj, konferencoj, informado, terminara komisiono.

**Estrarano:** Julián HERNÁNDEZ ANGULO, Arbol Seco 371B e/Clavel y Santo

Tomás, Centro Habana, Ciudad Habana, Tel. (+53) 6404484,

<[julian@esperanto.co.cu](mailto:julian@esperanto.co.cu)>. Landa agado, komisiono pri lerneja agado.

---

*Titolpaĝe supre:* Diploma de partopreninto en la metodika seminario de Katalin Kováts sur la Esperanto-Insulo; *malsupre:* La plej juna kursano de E-Insulo estis Huang Zeyano (Suno), filo de nia sekretario Trezoro. (Fotoj de Katalin Kováts)

---

## *Scienca Komitato*

**Prezidanto: Humphrey Tonkin**,  
Usono, University of Hartford;  
AdE<sup>1</sup>

**Vicprezidanto: Detlev Blanke**,  
Germanio, Prezidanto de la Societo  
pri Interlingvistiko

### **Membroj:**

**Vera Barandovská-Frank**,  
Germanio, Universität Paderborn;  
AIS<sup>2</sup>

**Duncan Charters**, Usono, Principia  
College, Elŝah

**Renato Corsetti**, Italio, Università  
degli Studi di Roma „La Sapienza”;  
AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta**, Barato, LRU,  
Indian Statistical Institute, Kolkata;  
AdE<sup>1</sup>

**Michel Duc Goninaz**, Francio,  
Université de Provence; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių  
universitetas

**Wim Jansen**, Nederlando,  
Universiteit van Amsterdam

**Boris Kolker**, Usono; AdE<sup>1</sup>

**Iłona Koutny**, Pollando/Hungario,  
Uniwersytet im. Adama

Mickiewicza w Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Maria Majerczak**, Pollando, Uniwer-  
sytet Jagielloński w Krakowie

**Geraldo Mattos**, Brazilo, Federacia  
Universitato de Paranao; AdE<sup>1</sup>

**Aleksandr Melnikov**, Rusio,  
Академия Сельскохозяйственного  
Машиностроения

**Radojica Petrović**, Serbio,  
Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha**, Hungario, MTA  
Nyelvtudományi Intézet

**Sekretario: Aida Čižikaitė**, Litovio

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

<sup>2</sup> AIS – Akademio Internacia de la  
Sciencoj, San-Marino

## **Enkonduko**

*Karaj Legantoj,*

Lastmomente... la Estraro de UEA april-  
fine diskutis edukadon dum 2,5 horoj.  
Jareke la jubilea laboro transiris de ILEI  
al pli vasta teamo; la kurso 125 de ILEI  
realiĝos tra pli longa periodo.

La Tutmonda Skriba Ekzamentago ĉe  
la KER-ekzamenoj altiris ĉ. 380 kandida-  
tojn en 17 landoj; UEA vojaĝigos du ek-  
zamenantojn al Moskvo por gvidi parol-  
an ekzamenon. Gravus pli klare diferen-  
cigi la ekzamenojn UEA/ILEI disde  
KER: pli modesta kosto, testado de mo-  
vadaj konoj, uzeblo kie malpli gravas  
eŭropa oficialeco. ILEI proponis kiel efike  
realigi tri-nivelan oferton. Reage al  
pledoj, ni starigu pli baznivelan ekza-  
menon, por landoj sen enlanda sistemo.  
Ni severigu la nunan elementan ekza-  
menon por fariĝi nova meza nivelo. Tiu  
nivelo, kun severigo kaj ampleksigo de la  
kulturaj partoj, fariĝu supera nivelo.

Pri instruista trejnado, la permodula  
skemo kaj normaro evoluigata de ILEI  
permesus al ĉiu aganto flekseble kun-  
labori. [Vidu la sekvan artikolon].

UEA transprenas partan financadon de  
la Interlingvistika Katedro en la Uni-  
versitato de Amsterdamo.

Kompletigo de la financado de UEA al  
edukado dum 2012 sumas je €1200 el la  
2000 proponitaj de ILEI.

Alikampe, ni vidas ĉ. 50 aliĝojn por nia  
konferenco en Kunming, kaj eblon je  
kvoruma komitato tie. La membroj por  
2011 estos ĉ. 670 kaj momente preskaŭ  
500 por 2012 – nek katastrofa, nek brila.  
Restas laboro sur ĉiuj kampoj!

*Jozefo NÉMETH, redaktoro*

# Instrukapbligo, modula trejnado

de Zsófia KÓRÓDY, estrarano de ILEI (Germanio/Hungario)

ILEI en sia nova statuto celas kunligi ĉiufakajn kaj ĉiunivelajn e-istajn edukistojn kaj instruistojn tra la mondo pere de la unikaj komunikaj valoroj de E-o. En la statuto de ILEI inter la celaro aperas ankaŭ „4.8 *Aranĝi internaciajn ekzamenojn pri kapablo en apliko kaj instruado de E-o.*”

ILEI membrigas kaj prizorgas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri tiuj celoj; la organizaĵo proponas siajn servojn al ĉiuj, sendepende de tio, ĉu ili havas universitatan diplomon aŭ ne.

Estas nia asocia intereso ankaŭ la faka trejnado de estontaj gekolegoj, instrukapbligo de junaj aŭ maljunaj interesiĝantoj. Dum kelkaj jaroj, jardekoj ni povis ĝoji pri la altnivela E-klerigado ĉe Universitato ELTE en Budapeŝto, Hungario. Centoj da diplomitoj ricevis tie oficialan universitatan fındokumenton, kiu estis komparebla, egalvalora al la diplomoj pri aliaj lingvoj. Tiuj oraj tempoj estas for kaj ni povas nur spekti la klopodojn de kelkaj landoj, kiuj strebas akceptigi la fakan klerigadon de E-instruistoj al ŝtataj, universitataj institucioj. Aliaj iumaniere provadas en siaj asociaj kadroj solvi tiun taskon, se ne estas je dispono ekstermovadaj ebloj.

## Skizo de la ILEI-UEA ekzamensistemo

Ni rigardu, kion proponas en sia ekzamensistemo ILEI kun UEA? Ekzistas du niveloj. La unua estas la t.n. internacia elementa, kiu en sia postularo estas pli proksima al iu t.n. meza ekzameno ol al elementa, do ni povas konstati, ke la nomo povas misgvidi kandidatojn al la ekzameno. Des pli, ke ĝi, krom la ĝeneralaj lingvaj kapabloj postulis testadon ankaŭ de bazaj literaturaj, movadhistoriaj konoj. La sekva nivelo estas la t.n. internacia meza ekzameno, kiu postulas pli altan gradon de komunika kapablo, kune kun pli severe testataj primovadaj kaj literaturaj konoj. En la nuna sistemo ne ekzistas triagrada, t.n. supera ekzameno, sed ekzistas ekzameno pri instrukapablo post la unujara trejnado kadre de la komuna projekto de UAM (Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando) kaj ILEI. La kursoj okazas en UAM, sed la finan diplomon donas ILEI, do temas pri movada dokumento.

## **Mallonga historio de la unujara instrukapabla trejnado**

*(kompilita laŭ informoj ĉe <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>)*

ILEI dum longa tempo deposedis la agadojn de mag. Irena SZANSER kaj aliaj en la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj ne havis regulan trejnsistemon por kapabligi E-instruistojn. La kontrakto inter la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI pri kunlaboro en instrukapabligo estis subskribita en 2007 (flanke de UAM de d-rino Ilona KOUTNY, gvidanto de IS, de la dekanato de la Novfilologia Fakultato de UAM, prof. Józef DARSKI kaj la vicdekanato prof. Jacek WITKOŚ, aliflanke de Zsófia KÓRÓDY, tiama vicprezidanto de ILEI).

Estis oportuna, praktika solvo utiligi la trian jaron de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj (kiuj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas internaciajn lingvojn kaj planlingvojn kaj detale okupiĝas pri la gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de E-o) kaj ebligi al la studemuloj la viziton de prelegoj de la lingvopedagogia specialiĝo kaj ankaŭ de aliaj tiam okazantaj kursoj. Tiun specialiĝon gvidas d-rino Katalin KOVÁTS (tiel enŝaltiĝis ankaŭ *edukado.net*), kontribuis Maria MAJERCZAK (metodikistino el la Jagiellona Universitato (Krakovo), Ilona KOUTNY kaj ankaŭ Zsófia KÓRÓDY.

En la studjaro 2007/08 okazis la unua kunordigita trejnado en Poznano, kiu enhavis du unusemajnanjn surlokajn sesiojn (kun intertempa reta konsultiĝo) kaj la ekzamenon en septembro 2008. La novaj kursanoj (7 personoj el 5 landoj) krom la lingvopedagogiaj kursoj sekvis ankaŭ etkurson pri literaturo (István ERTL), pri movadhistorio (Aleksander KORĴENKOV) kaj gramatiko (Ilona KOUTNY), ili povis aŭskulti donace la aliajn aktualajn kursojn de la Interlingvistikaj Studoj.

En septembro 2008 la partoprenantoj de Interlingvistikaj Studoj havis la eblon testi sin mem kaj samtempe la unuan C1-nivelan teston (el la novtipa lingvoekzameno ellaborita kun la budapeŝta lingvoinstituto ITK). Dum tiu sesio ekzameniĝis kaj ricevis instruistan ILEI-diplomon la unuan fojon 3 partoprenantoj [*vd la sekvan foton, de maldekstre*]: Jurate BARTASKIENĖ, Litovio (Utiligo de poemoj, rimaĵoj kaj kantoj en la lingvoinstruado); Edit SLEZÁKNĖ TAR, Hungario (Instruado de akuzativo je diversaj niveloj) kaj Witold CZERWINSKI, Pollando (Pedagogia vortareto Esperanta-pola ).



De maldekstre: *Jurate BARTASKIENĖ, Edit SLEZÁKNĚ TAR, Zsófia KÓRÓDY kaj Witold CZERWINSKI*

En la studjaro 2009/10 aliĝis 10 partoprenantoj el 8 landoj. El ili 6 akiris sian instruistan diplomon de ILEI. Denove okazis KER-ekzameno, al kiu aliĝis 5 personoj el la instruista trejngrupo. En septembro 2010 la instruista grupo jam la trian fojon akompanis la tradiciajn interlingvistikajn sesiojn en Poznano. La du surlokaj unusemajnaj sesioj (septembre kaj februare) disponigis koncize la necesajn metodikajn konojn por profesie instrui E-on. Post hejma kaj reta laboro en septembro 2011 okazis ekzamenoj de 8 partoprenantoj el la 11 (el 6 landoj): ili prezentis sian finlaboraĵon kaj sukcese trapasis la finan kompleksan ekzamenon, tiel ili akiris la instruistan diplomon de ILEI.

### **Novaj ebloj, novaj planoj por instrukapbligo**

La komencita kunlaboro kun UAM kaj kelkjara daŭra funkciado de la instruista trejnado estis grava paŝo kaj estas bona solvo por tiuj, kiuj bezonas internacian atestilon de nia Ligo. En 2009 montriĝis ankaŭ alia

bezono: enkadre de Grundtvig-projekto en la Dumviva Lernado-Programo, grupo da lernemaj germanoj, poloj kaj slovakoj el la aĝgrupo 55+ komencis trejniĝi por fariĝi klubgvidantoj, organizantoj, instruantoj de E-kursoj. Laŭ la plurjaraj spertoj de fakuloj en Herzberg am Harz, kie regule okazas klerigkursoj por Germana E-Asocio, Zsófia KÖRÖDY, estrarano de ILEI, kunlaboranto de Interkultura Centro Herzberg, ellaboris por tiu Grundtvig-grupo proponon, skizon por instrukapabliga studado surbaze de modula sistemo. Dum la du jaroj de la Grundtvig-projekto tiu skemo estis sekvata kaj estis la unua pruvo de sukcesa uzado.

La postularo kaj proceduro de la trejnsesioj en Poznano jam fariĝis pruvitaj, bone funkciantaj, priskribitaj normoj por la akiro de ILEI-diplomo. Sed ne ĉiam ĉiuj studemuloj el la mondo povas partopreni tie en sesioj, do estas bezono je pli fleksiĝema sistemo, kiu permesas la studadon en aliaj lokoj, en alia tempo, ne nur la 2x1 semajnojn en februaro kaj septembro. El tiu bezono fontis RITE, la reta instruista trejnado lanĉita kaj prizorgata de Katalin KOVÁTS. La klerigsesioj de Germana E-Centro jam ekde jaroj sukcese praktikas tiun modelon, donante al la kandidatoj liberecon decidi pri la sinsekvo de la sekvataj kursoj, prelegoj, plenumi memverkajn taskojn en periodoj taŭgaj por ili, kaj akiri la bezonatajn kreditpoentojn.

### **Temaro, moduloj**

Kiujn temojn, kiujn modulojn oni sekvu por trejni kapablajn instruistojn, kursgvidantojn? En la modulara sistemo temas pri kompilita listo de temproponoj, kiuj konsistigas la enhavon de sesioj, sed estas en libera sinsekvo plenumebaj laŭ la ebloj de edukcentroj, intensaj someraj metodikaj kursoj ktp. Por sukcesa prepariĝo oni bezonas la lingvo-nivelon B2-C1 laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). La enhavo de la moduloj estas en harmonio kun la postularo de la lingvopedagogia kurso de UAM kaj proponas kompleksan lingvan kaj fakan kursaron pri la fakoj: lingvopedagogio, gramatiko, interlingvistiko, metodiko, historio, kulturo, varbado, movadaj konoj ktp.

Metodiko kompreneble ludas la ĉefan rolon: instruado de vortprovizo, ekzercado de gramatiko, evoluigo de kapabloj, motivigo, uzo de instruhelpiloj, transdono de E-kulturo, mezurado, taksado, organizado de instrulaboro ktp. Post ekz. 2-semajna intensa trejnado povas okazi konsultiĝo kun kursgvidantoj, pretigo de laboraĵo pri metodika temo, kies

prezento estas parto de la fina ekzameno kun praktika pruvo de instru-kapablo en formo de modelleciono. Sukcesintoj ricevos ILEI-diplomon. La enhavo kaj la postularo devas esti respektataj de lokaj organizantoj, proponantoj de klerigsesioj por kandidatoj de ILEI-diplomo. Tiu sistemo bone subtenos ankaŭ la strebojn de ekstereŭropaj gekolegoj aspirantaj je internacia atestilo pri instrukapablo. En 2012 – okaze de la 125-jara jubileo de Esperanto – inter 13-20 kaj 20-27 julio estos someraj staĝoj en Herzberg am Harz. La du-semajna kursaro plenumos la postulojn de ILEI-UAM kaj bone preparos la aliĝintojn al la fina ekzameno, kiu povos okazi ekz. post unu jaro, en 2013 dum la ILEI-konferenco en Herzberg am Harz.

### Modelo de moduloj por instruistaj trejnkursoj de ILEI

	1	2	3	4
1-2	enkonduko interkonatiĝo konatiĝo kun la urbo, kursejo enhavo, celo de la trejnado, kunlaboro, planado	lingvistiko interlingvistiko esperantologio (enkonduko) fonetiko gramatiko leksiko sintakso stilistiko	E-lernado: formoj, ebloj komputilaj programoj por lingvoinstruado kaj lernado, rolo, uzo de interreto E@I projektoj por kaj per E-o	literaturo famaj periodoj literaturaj skoloj tradukita E- literaturo originalaj verkoj poezio
3-4	enketado lingva, gramatika testo niveligo lingvaj ekzer- coj personaj lingvaj spertoj	historio nacia kaj internacia E-movado strukturo, organizaĵoj funkcioj, kunvenoj	metodologio plej gravaj instrumetodoj Manlibro por instruado	naciaj kaj inter- naciaj E- ekzamenoj UEA/ILEI „De nivelo al nivelo” UEA/ITK ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) taskotipoj, lingva prepariĝo



5-6	konatiĝo kun la organizanta institucio, ĝiaj taskoj, agadoj, roloj, spertoj E-kulturo, vivo internaciaj projektoj	gramatiko de E-o specialaĵoj, lingva perfektigo, konatiĝo kun lernolibroj (laŭ celata, lernenda metodo)	praktika prezentado de metodoj (persone, per filmoj), analizo de spektita instruado, instruhero	instrupraktiko: ellaboro de lecionplano modelaj lecionetoj, rolo, tipo, konduto, personeco de instruistoj; informoj/faka helpo: kiel verki fakartikolojn, diplomlaboraĵon
7-8	E-centroj, bibliotekoj faklibroj vortaroj pedagogiaj verkoj lernolibroj instruhelpiloj E-gazetaro eldona laboro	trarigardo de lingvaj ekzercoj tipoj niveloj aliaj instruhelpiloj edukado.net trarigardo de la lecionoj de elektita, celita lernolibro	informado varbado organizado kurs-anoncoj, alvokoj afiŝoj, artikoloj organizado de kluboj, programoj, kurstipoj, planado de kursoj, instruplano, enhavo de la kurso	ekzameno resumo pritakso de la trejnado estontaj planoj daŭrigo aŭ komenco de projekto

## Strategio por edukado – kun rimedoj

UEA delonge bezonas freŝan dekjaran Strategian planon; ĝi starigis komisionon por prepari tion; ILEI estas reprezentata en tiu komisiono. En marto ĝi transdonis al la Komitato de UEA 16-paĝan dokumenton ‘Strategia Vizio por UEA’, kiu formas la bazon por la plano, kiu espereble ekzistos en traktenda formo ĝis la komenco de la mandato de la nova estraro de UEA en 2013.

La vizia dokumento ege gravas por ILEI, ĉar ĝi ne nur agnoskas la ŝlosilan rolon de edukado kaj instruado (tion ja faris la plano de 2000-2010), sed proponas mekanismojn por dediĉi seriozajn rimedojn al la belaj intencoj. La antaŭa plano starigis tri-pilieran modelon: Disvastigo, Edukado, Utiligo (alivorte Informado, Instruado, Aplikado). Tio estis valora analizo, feliĉe la nova plano konservas tion, sed sub aliaj nomoj, kaj kun aldono de kvara elemento: **konsciigo, kapablo, komunumo kaj kunordigo**. Gravus tiu kvara elemento, ĉar tio havigas manierojn transformi noblajn celojn al konkretaj projektoj kaj rezultoj. **Kapablo** subsignifas vastan kampon, sed kohera instruisto-trejnadado trovas sian lokon tie, kiel ankaŭ intensigo de interkulturaj iniciatoj kaj pli evoluinta ekspluatado de retaj kursoj kaj rimedoj. Entute, la vizio forte akcentas la transforman rolon de retuzo. La lastaj kvar paĝoj de la vizio prezentas tabelon por la kvar pilieroj kun kolumnoj *Ĝenerala Strategio* kaj *Reta Evoluigo*, kun subtemoj *Strategia vizio*, *Ĉefa rimedo*, *Ĉefaj agadoj* kaj *Kvinjaraj SMART-celoj* (t.e. la celoj estu Specifaj, Mezureblaj, Atingeblaj, Realaj kaj Trafaj). Ni aperigas apude la tabelo-parton pri Kapablo.

La financado de la eduka agado okazos pere de starigota Fondumo (aŭ eĉ Centro), kun ŝlosilaj partneroj ILEI, *edukado.net* kaj *lernu.net* – do la komputika grupo *E@I*. Ni esploru momente perspektivojn por instruista trejnado kaj atestigo, kies fonon liveras artikolo de Zsófia KÓRÓDY sur p.4-9. ILEI, kunlabore kun UEA, la proponata Fondumo kaj aliaj partneroj, estas la logika instanco por difini normojn kaj strukturon por instruista trejnado. Kun novaj fortoj kaj rimedoj, imageblas, ke la atestiloj de ILEI povos atingi ian gradon da oficialeco ĉe iu realmonda instanco. Ni tamen ne strebas je centrisma organizado de la kursoj kaj ekzamenoj. Tiuj unuavice restos en la manoj de diversaj agantoj – la nunaj kaj eble novaj, kiuj akiras grandan manovripovon rilate al kurs-formo, -daŭro kaj iagrade ankaŭ enhavo. Sed la irado estos malpli disa kaj pli kohera, se ĉiu aganto respektos bazan strukturon kaj normaron. La modulareco planata por tiu skemo donos maksimuman flekseblon al la realigantoj, ekzemple por reordigi la materialon laŭ lokaj bezonoj kaj cirkonstancoj, kaj ĝin dispartigi inter retaj kaj fizikaj elementoj. Ĝi donos maksimuman flekseblon al trejnatoj, kiuj povos plenumi la diversajn ‘brikojn’ en libera ordo, kaj ĉe pli ol unu trejnejo.

La nova aliro al la financado kaj rimedigo de la taskaro spegulas la starpunkton, kiun ILEI vane jam tra pli ol dudek jaroj provadis komuniki: niaj

membroj kotizu al ILEI, por ke ĝi liveru al ili servojn (kiel ĉe aliaj Fakaj Asocioj), sed oni ne imagu ke ili finantu la tutecon de niaj instruprogramoj – la kapablo de novaj generacioj de parolantoj kaj uzantoj estas afero centra al la celaro de la tuta movado. Tial, la naskiĝanta vizio kaj plano meritas aprobon (eĉ entuziasmon) de ILEI, sub la kompreno, ke la ligo povos reteni sian sendependecon, dum ĝi kunlaboras plenforte en la realigo de tiu vizio.

**Tabelo pri kapablo**

KAMPO	ĜENERALA STRATEGIO	RETA EVOLUIGO
<p><b>KAPABLIGO</b></p> <p><b>Kunordiga instanco:</b> Fondumo por Klerigo kaj Kapablo, kunlabore kun ILEI edukado.net lernu.net</p>	<p><b>Strategia vizio:</b> UEA – kleriga kaj aktiva organizo por esperantistoj je ĉiuj niveloj, kun emfazo pri lingvaj kapabloj, movadaj scioj, interkultura komunikado</p> <p><b>Ĉefa rimedo:</b> Funda reorganizo de la eduka/ kleriga flanko de UEA, ekz. per Fondumo por Klerigo kaj Kapablo cele al longperspektiva integrado kaj kunfinancado de ILEI, edukado.net kaj lernu.net</p> <p><b>Ĉefaj agadoj:</b></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• Kursoj, seminarioj, aranĝoj por pli altaj niveloj de lingvo-uzado</li> <li>• Eldonado kaj disvastigo de valoraj klerigaj verkoj en diversaj ĝenroj</li> <li>• Instruista trejnado pri lingvo-instruado, interkultura komunikado, kultura klerigado por plenkreskuloj</li> </ul>	<p><b>Strategia vizio:</b> UEA – kanalo por konstanta alfluado de novaj esperantistoj tra retkursoj kaj retforumoj al surlokaj kursoj kaj kulturaj aranĝoj por parol- kaj kultur-<i>kapablo</i></p> <p><b>Ĉefa rimedo:</b> Kunlabore kun edukado.net, lernu.net, kaj ILEI (ekz. kadre de la Fondumo), evoluigo de klerigaj kaj aktivigaj paĝaroj kaj rimedoj en la reto, kun forta ligiteco al eksterretaj agadoj kaj normoj</p> <p><b>Ĉefaj agadoj:</b></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• Daŭra evoluigo de retaj kursoj diversnivelaĵaj kaj diversenhavaĵaj</li> <li>• Eksperimentado pri novspecaj kursoj kaj aranĝoj por retaj lernantoj</li> <li>• Varbado por la KER-ekzamenoj kaj aliaj testoj de kulturaj konoj/lingvaj kapabloj</li> </ul>

	<p><b>Kvinjaraj SMART-celoj:</b></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• Disvastigo de paroligaj/superaj kursaroj (ĝis 10 jare, diversregione)</li> <li>• Eldonprogramo (4 titoloj jare, kresko ĝis 3 000 vendoj jare)</li> <li>• Novaj instruistoj (kresko ĝis 300 jare)</li> </ul>	<p><b>Kvinjaraj SMART-celoj:</b></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• Sukcesaj trapasoj de retaj kursoj je KER-nivelo B1 (kresko ĝis 5 000 jare)</li> <li>• Partopreno de retaj lernantoj en lokaj aranĝoj (kresko ĝis 2 000 novaj jare)</li> <li>• Sukcesaj ekzameniĝoj je KER-niveletoj B1, B2, C1 (ĝis 500 jare)</li> </ul>
--	---	--

*Stefan MACGILL  
Prezidanto de ILEI*

## Esperanto-Insulo I – Fokusiĝo sur la tre intensa kurso por komencantoj kaj NE-esperantistoj

de *Dennis KEEFE* (Ĉinio)

Jam en la revuo *Esperanto*, en la raportoj de *El Popola Ĉinio*, en la retnovaĝejo *La Mondo*, en la revuo *Ondo de Esperanto* kaj en la retejo *Balta Ondo* aperis longaj artikoloj pri la eksperimento Esperanto-Insulo I. Tiuj artikoloj bone preparolas la tri ĉefajn partojn de la projekto: la treege intensa BEK-Kurso por komencantoj de Dennis KEEFE, la Metodika Kurso de Katalin KOVÁTS kaj la universitat-nivelaj kursoj de Federico GOBBO kaj Ron GLOSSOP. Krom tiaj informoj estas filmraporto de *edukado.net* pri partoj de la kursaro. Se tio ne sufiĉas, sur unu blogloko troviĝas eble 500 fotoj pri la tutmonata aranĝo.

Esperable ekaperos aliaj artikoloj pri la lanĉo de la Universitato de Esperanto, kaj ankaŭ espereble videblos en la paĝoj de *IPR* artikolo laŭ la vidpunkto de instruista trejnado, ĉio el rekta sperto kaj analizo de niaj profesoroj Ron GLOSSOP, Federico GOBBO kaj Katalin KOVÁTS. En ĉi tiu artikolo, tamen, mi volas limigi min al la enmeto en Ĉinujo de kurso, kiu verŝajne ne nur estis la plej intensa iam ajn instruata en Ĉinio por Esperanto, kun ok horoj de rekta instruado ĉiutage, sed ankaŭ la plej internacia, kun homoj el deko da landoj. Eble estis la unua fojo en Ĉinio kiam kaj ĉinaj studentoj kaj eksterlandanoj sukcese lernis lingvon utiligante

la SAMAN lernomaterialon en la sama klasĉambro. Tio, laŭ mi, eblas nur per Esperanto, kaj ni esperantistoj povas fieri pri tio.



Unue, ni ekrigardu la intensecan naturon de la kurso. Ekrigardo de la kalendaro kaj horaro helpas al ni kompreni la nekutiman strukuron de la lernado. La kurso komenciĝis la 12an de januaro kaj finiĝis unu monaton poste. Do ĝi enhavis kvar kompletajn, sinsekvajn semajnojn kaj instruiĝis ĉiutage krom dimanĉe. Dum la kurso okazis tritaga feriado pro la fama ĉina nova jaro. Entute, estis ĉirkaŭ 200 horoj de enklasĉambra instruado, sed aldone al tiu kvanto da horoj estis proksimume 2 – 3 horoj vespere de hejmtaska laboro. Ne malofte, gelernantoj studis kaj preparis hejmtaskojn ĝis la noktomezo. Do, la kvanto da horoj kaj la ritmo estis tre altaj kompare kun tradiciaj kursoj. Oni povus diri, resume, ke la kurso por komencantoj estis kvazaŭ tuttempa lernado.

La internacieco de la kurso estis tre nekutima afero por Ĉinio. Estas multe da eksterlandanoj kiuj venas al Ĉinio por studi la ĉinan, sed ili kutime ne intermiksiĝas kun ĉinaj studentoj. El la 82 gelernantoj (jes ja, 82 en la sama klasĉambro, nombrataj en la dua semajno), la plejparto estis ĉinoj kaj la plejparto el ili studentoj inter la aĝoj de 18 kaj 25 jaroj. En tiu grupo estis

deko da koreoj, kvino da mongoloj kaj homoj el pluraj aliaj landoj, nome Italio, Hispanio, Francio, Tajlando, Japanio, Kanado, Slovakio, Latvio, Danlando kaj Aŭstralio.

La okdek kursanoj sidadis kvarope ĉirkaŭ tabloj. Komence estis 19 tabloj; post kelkaj tagoj aldoniĝis unu plia. Dum la kurso iom post iom perdiĝis tabloj, kaj ĉe la fino eble estis 15. Meze de la kurso, la grupo dividiĝis kun Penny Vos, aranĝanta specialajn lecionojn por la gelernantoj kiuj malfacile kapablis sekvi la rapide disvolviĝantan BEK-Kurson. Ĉe tiuj tabloj kutime estis du aŭ tri ĉinaj studentoj, kaj por kompletigi la kvaropon aldoniĝis unu aŭ du lernantoj el aliaj landoj. Ĉe tipa tablo povus esti du ĉinoj, unu koreo kaj unu italo, aŭ eble du ĉinoj, unu mongolo kaj unu aŭstraliano, ekzemple. Tia mikso helpis motivi la lernadon de E-o, ĉar nur Esperanto kapablis kunigi la kvaropon en konversacio.

La instruo-ritmo estis la sekva. Unue, la instruisto instruas gramatikan punkton. Poste la instruisto gvidas iom da praktikado kun ĉiuj gelernantoj. Kaj finfine, dum eble inter 15 kaj 20 minutoj, ĉiuj grupetoj praktikas tiun gramatikaĵon, tute en Esperanto, en siaj grupoj. Dum tiu grupopraktikado, la instruisto rondiras, provante kontroli ĉu la praktikado disvolviĝas laŭ la modelo. Dum la 200-hora kurso, estis eble ĝis 300 instruo-unuoj, kiuj plejparte videblas en la BEK-Kurso ĉe la retejo [www.bekkurso.info](http://www.bekkurso.info). Sed estis ankaŭ multe da aldonaj ekzercoj, eltiritaj el pluraj metodoj utiligataj dum la kurso. Tiuj ekzercoj povus esti el la netradicia TKR, Tutkorpa Responda Metodo de Asher ĝis la tre tradicia utiligo de diktaĵoj. La ĉefa afero, ĉiam, estis utiligi variecon por ke la gelernantoj vidu similajn gramatikaĵojn kaj vortojn en malsamaj momentoj laŭ malsamaj metodoj.

Dum la praktikado, la aktivado ĉe 19 tabloj samtempe kreis tre laŭtan bruon kiu ofte malfaciligis la komprenon kaj la sukcesan disvolviĝon de la leciono. Aldone, la sonkvalito de la klasĉambro ne estis tre bona, kun problemo de resonado, kiu malfaciligis la orelan komprenon. Tiu problemo parte solviĝis kiam kelkaj grupoj iris ekster la klasĉambro por la praktikada parto de la leciono. El la 80 komencantoj en la kursaro por komencantoj, pli ol la duono jam lernis iom da Esperanto antaŭ ol veni, tamen tre malmultaj homoj kapablis sukcese fari eĉ la duonon de la BEK1, do la unua okono de la kompleta kurso. Eble unu el kvin de la gekursanoj estis veraj komencantoj, kiuj ne kapablis fari sukcese eĉ la duan paĝon de BEK.

Mi provis kompari la BEK-Kurson en Ĉinio kun la BEK kiun mi faris ĉe la Universitato de San Francisko por NASK, la multajn kursojn kiujn mi faris en Gresillon kaj Plouézac kaj la kursojn kiujn mi faris en Hispanio en la 80-aj jaroj. Evidentiĝis, ke spite al la intenseco de la kurso sur Esperanto-Insulo I, la gelernantoj en tiuj kursoj de Eŭropo kaj Nordameriko multe pli rapide progresas. Kial?

La problemo de la lernado de E-o en Azio ne estas la gramatiko, sed estas la tre-tre alta kvanto da nekonataj vortoj. La internaciaj vortoj de E-o, preskaŭ tute ne eniĝis en la ĉinan lingvon. Ĉiu eŭropano havas la grandan avantaĝon de almenaŭ pasiva kono de miloj kaj miloj da internaciaj vortoj en sia kapo. La ĉinaj studentoj, eĉ se ili lernis multe el tiuj vortoj dum siaj inter ok kaj 10 lernojaroj de la angla lingvo, ne kapablas rapide utiligi ilin, nek bone kapti ilin kiam ili aŭskultas la lingvon.

Mi provis kompari la kurson en Hajnano ankaŭ kun la lingvokursoj kiujn mi konas en Ĉinujo. Eble multe da neazianoj dirus, ke 80 gelernantoj en la sama kurso estas tro da partoprenantoj, tamen, en Ĉinujo eĉ ĉe la monriĉa prestiĝa Universitato de Nankino, kursoj ofte havas inter 100 kaj 200 studentojn, kaj kvankam lingvokursoj estas pli malgrandaj, mi konas kelkajn kun pli ol 80 studentoj. Ĉe aliaj universitatoj povas troviĝi ĝis centoj da gelernantoj en kurso pri lingvoj. Se ni instruas E-on en Ĉinio, indas ke ni lernu kiel instrui al grandegaj grupoj. Kompare kun la rezultoj de aliaj kursoj en Ĉinujo, laŭ la ĉinaj organizantoj, neniam okazis tiom da progreso en tiom malmulte da tempo en tiu lando. Dum miaj kvin jaroj en Ĉinio, parolante kun multe da homoj kiuj lernis kaj studis Esperanton dum jaroj kaj eĉ dek aŭ dudek jaroj, ĉefe tradukante, mi povas konfirmi la diraĵon de la ĉinaj organizantoj.

Mi pensas, ke la fenomeno de homoj el malsamaj lingvogrupoj kiuj studas fremdan lingvon ekde la KOMENCO per la sama lernomaterialo kaj en la samaj grupoj, estas novaĵo kiu meritas la priatenton de la ekstera mondo. La probableco, ke ĉinaj studentoj kune kun koreoj kaj mongoloj povas samtempe, samlaborgrupe lerni lingvon kune kun eŭropanoj estas novaĵo. Kaj ankaŭ ke tiu eksperimento havis konkretajn rezultojn en periodo de nur unu monato estas novaĵo. E-o, kiel mi diris, povas esti fiera, kaj povas montri sin al la ekstera mondo nun kun eĉ pli da memfido pro, parte, la eksperimento de E-Insulo I, en la jaro 2012 kun la 125-jariĝo de tiu lingvo.

Pri la kvalito kaj pri la lernado mem dum la kurso en Esperanto-Insulo I, eblis konstati jam meze de tia intensa praktikado, ke multe da veraj komencantoj, neeŭropdevenaj, kapablas utiligi E-on por sukcese komuniki kun homoj el Eŭropo. Tio ja estis la celo, la komunikado. Multaj homoj rimarkigis, ke la novaj studentoj el la Universitato de Hajnano povas konversacii dum horoj kun neĉinoj. Tiusence, la kurso sukcesis. Tia lernado, laŭ membroj de la Organizo-Teamo, neniam antaŭe okazis en Ĉinio.

Tiu sukceso devenas ne nur de la intenseco de la kurso mem, sed ankaŭ grandparte de la ritmoŝanĝo kun la kurso prezentata de Katalin KOVÁTS kaj ŝiaj gelernantoj de la Metodika Kurso, kiu okazis paralele kun la kurso por komencantoj kaj la kursoj ĉe universitata nivelo de Federico GOBBO kaj Ron GLOSSOP. Ĉiutage ekde la dua semajno, la Metodik-anoj alvenis al la BEK-Kurso, kaj dum la lasta du-hora periodo de la tago instruis la BEK-anojn. Kelkfoje tio fariĝis kun Katalin instruanta al la tuta grupo, kaj kelkfoje tio okazis kun pluraj stacioj en diversaj lokoj de la klasĉambro al kiuj la lernantoj iris por ricevi lecionetojn. Tiamaniere, la gelernantoj povis ĉeesti lecionetojn en ĉiu stacio, ĉiukvaronhore, ekzemple.

Kontribuanta al la bona disvolviĝo de la kursaro estis ankaŭ la komuna tagmanĝo ĉiutage inter la dekdua kaj la unua. Loka restoracio ĉiutage alportis tagmanĝon por ĉiuj en la klasĉambro kaj la tre spertaj e-istoj de la kursoj de la Universitato de E-o kaj la Kurso pri Metodiko kune manĝis dum unu horo. Tie homoj el pli ol dudek landoj, spertaj kaj komencantaj, kunbabilis. Tio rolis kiel granda motivado por la novaj gelernantoj de E-o.

Bonaj helpantoj abundis dum la aranĝo. Pri instruado en mia kurso, mi jam menciis la bonajn kontribuojn de Katalin KOVÁTS kaj ŝiaj gelernantoj. Mi ankaŭ parolis pri Penny VOS, kiu fakte faris multe pli ol helpi kun la gelernantoj kiuj bezonis specialan lingvohelpon. Aldone estis Maja MERIAUX, Ĝoja el Koreio kaj Michèle REVERDY, kiuj helpis korekti la BEK-hejmtaskojn kaj la ekzamenetojn. Kaj, ludantaj ŝlosilan rolon en la instruado dum la BEK-Kurso estis Jano CLARK el Usono/Ĉinujo, kaj Fejfi FEIFICOVA el Slovakio, kiuj ofte instruis la tutan grupon kaj helpis kun multaj aliaj taskoj. Finfine, jam menciigis en aliaj artikoloj, ke la tuta projekto E-Insulo I disvolviĝis sen subvencioj. Sed tia granda projekto (ni eble memoras ke ĝi daŭris unu tutan monaton, kaj la intensaj kursoj estis 8-horajn ĉiutage kun 2-3 hora vespero-kunstudado) ne povus okazi sen la



antaŭa planado kaj helpo de ILEI-Ĉinio kun ARKO, la tutmonata tuttaga helpo de TREZORO, TRIGO, SPADO, WU kaj HOSEMO, kun la antaŭa helpo-planado de la Universitato de Nankino kaj s-rino CUI.

Kiel mi diris ĉe la komenco de ĉi tiu artikolo, Esperanto-Insulo I ne nur estis la kurso por komencantoj, kaj mi esperas, ke vi, kara leganto, nun turnos vian atenton al la aliaj du grandaj eksperimentoj kiuj okazis sur la Insulo: la tutmonata metodika kurso de Katalin KOVÁTS kaj la tutmonata Universitato de profesoroj GLOSSOP kaj GOBBO. Esperanto-Insulo ripetiĝos en la venonta jaro. Okazos alia kurso por komencantoj el la tuta mondo. Okazos pedagogia kurso por lerni kiel fari BEK-Kurson. E-Insulo ekzistas por fari ponton inter Azio kaj aliaj kontinentoj. Ni invitas vin partopreni kaj resti tutan monaton en la suda insulo de Ĉinio, Hajnano, ĉinlingve Hai Nan Dao (Maro-Sudo-Insulo).

E-Insulo stariĝis por esti tre tre intensa, serioza, tuttaga, tutmonata kurso por NE-esperantistoj kaj por homoj kiuj deziras paroli E-on flue kaj senhezite. E-Insulo ne kreiĝis por turismado. Se vi volas, renommu Esperanto-Insulon la Lingvo-Laboro-Insulo. Tamen, certe eblos turismi POST la intensa monato, sed ne dum. Tiukondiĉe, ĉiam aranĝiĝas kelkaj interesaj, mallongaj ekskursoj semajnfine kaj unu pli longa dum la ĉina novjaro. Sed se vi volas profiti de via restado en Ĉinio turisme, mi rekomendos, ke vi eble prikonsideru fari turismadon POST Esperanto-Insulo II en 2013. Ĉinio estas tiel granda, tiel riĉa je historio, tiel ĉarma kun sia lingvo... Post la intensa lernado, vi kaj viaj novaj geamikoj meritos tion. Informo kaj aliĝado por Esperanto-Insulo II ĉe [www.esperanto-insulo.info](http://www.esperanto-insulo.info). Esperanto-Insulo II disvolviĝos en la sama vintro-ferioj en Ĉinio, de januaro kaj februaro, 2013.

## **Filozofio kaj historio de informadiko per E-o**

de *Federico GOBBO* (Italio)

2012 estas grava jaro por informadikistoj de la tuta mondo, ĉar oni festas la centjaran datrevenon de la patro de informadiko, la brito Alan TURING (1912-1954). Do aparte bonvena estis al mi la invito de Dennis KEEFE, konata lingvoinstruisto kaj la lanĉinto de la Lingvaj Festivaloj, pri

kunlaborado al stariĝanta projekto, nome Universitato de Esperanto, per kurso rilate al la kulturaj aspektoj de informadiko.

Universitato de Esperanto celas doni ŝancon kleriĝi per E-o tra tutmonata, 48-hora kurso. La antaŭkondiĉoj por partopreni estis tre simplaj kaj klaraj, kaj pro tio mia opinio tre allogaj por jesi al la propono: nur profesoroj rekonitaj en Universitatoj, kun doktora titolo, povas doni kurson; la kurso estu esperantigo de kurso jam spertata nacilingve dum kelkaj jaroj en loka Universitato; la produktota materialo rilata al la kurso – lernolibroj, demandoj, k.a. – restos poste je ĉies dispono, danke al Krea Komunafaŭ licenco, tra interreto. Tio inkluzivas kompletan filmadon de la lecionaro kaj aparta sur sonbendigado. La modelo de Universitato de Esperanto estu perreta kursaro de la plej gravaj Universitatoj de la mondo, kiel ekzemple Harvardo, Yale aŭ MIT. Pro tio, la teknologiaj iloj uzataj dum la lecionaro estu prefere nigra tabulo kaj kreto. Profesoro Ron GLOSSOP, el Usono, estas



jam konata de la legantoj de IPR: li donis sian kurson pri *Alfronti Milton*, Esperanta adapto de analoga kurso prilaborita dum 25 jaroj. Mi ne havas instruan sperton tiom longan, sed mia kurso pri Filozofio kaj Historio de Informadiko jam ĝuas ses jarojn de prilaboro, kaj mi akceptis, ĉar mi volis profiti la okazon verki la lernolibron kaj kompreneble doni

la kurson, en E-o. Ordinare, mi ne tro ofte sukcesas kunigi mian profesion, universitatan laboron, kune kun la E-aktivado: ĝuste pro tio, mi konsideris la disdonadon de unumonata (48-hora) kurso vera nova defio. Interese, la temo de la kurso mi jam klarigis al miaj italaj studentoj dum ses jaroj. Tio starigas interesajn demandojn laŭ la pedagogia vidpunkto: kio ŝanĝiĝas en la kurso pro uzo de E-o anstataŭ nacia lingvo? Ĉu oni povas rekte kaj senpere traduki la enhavon aŭ ĉu bezonatas pli nuanca adapto de la enhavo? Fakte, ĝis la unua tago de la kurso, mi ne povis scii anticipe la viv-priskribojn de miaj studentoj. Dennis KEEFE klarigis al mi, ke temas ja pri universitat-nivela sed samtempe iom baza kurso, nome, oni ne pretendu anticipe specialajn apartajn konojn – ekzemple, por sekvi kurson pri Sociolingvistiko oni devas sekvi unue Ĝeneralan Lingvistikon; tio, en la

nuntempa infaneca fazo de Universitato de Esperanto, ankoraŭ ne eblas. Do, unue mi devis iom simpligi la enhavon.

Due, mi demandis al mi pri la kulturoj de miaj studentoj. Informadiko estas ĉefe produkto de la okcidenta kulturo – de la logika radiko de la greka filozofo ARISTOTELO tra la brita matematikisto Alan TURING ĝis la usona postduamondmilita gvida rolo, kun korporacioj kiel IBM, Mikrosofto kaj lastjare Guglo kaj Fejsbuko. Eble oportunas klarigi aparte al afrikaj aŭ aziaj lernantoj konceptojn kiel ekzemple Renesancon, sciencon, kiam oni alfrontas la historian fonon. Tion fakte mi nur duone sukcesis, simple ĉar plejparte la kursanoj venis el Eŭropo aŭ Usono – neniu el Afriko, dum la ĉinoj ne povis sekvi regule, pro la multaj organizaj engaĝoj. Sed, kiel ĝenerala rimarko, estas oportune, ekzemple en la lernolibro, starigi apartajn klarigojn: mi elektis enkonduki je la fino Glosaron kun klarigoj pri la fakaj vortoj. Tio estas ja riĉigo de nia lingvo.

Mi substrekas, kvankam mi parolis pri informadiko, la kurso ne estis aparte teknika, sed male precipe kultura: la fokuso estis ĉe la homoj unue, la ideoj due, la maŝintrakto de la ideoj trigrade. Sen homoj kaj ideoj, oni ne povas starigi novigajn maŝinojn. La espero estas, ke ĉi tiuj ekzemploj de mi kaj kolego Ron GLOSSOP havos posteulojn, por riĉigi la proponon de kleriĝo per Esperanto.

*Esperanto-Insulo, Hajnano, Ĉinujo, 12-a de februaro, 2012*

## **Ni instruu la veran E-on kaj ni instruu ĝin facila**

de Renato CORSETTI (Italio)

Hieraŭ mi trovis en la teksto de dissendo de unu el la plej konataj retaj radioj la vorton „legala” en la signifo de „laŭleĝa”. Tio pensigis al mi, ke la verkinto de tiu teksto neniam lernis la veran E-on, kaj opinias, ke E-o estas io simila al la franca aŭ al la hispana. Eble ne li sola kulpas pri tio. Efektive en malmultaj kursoj la instruisto insistas pri la vera strukturo de E-o.

### **1. Vera strukturo de Esperanto**

Esperanto naskiĝis en Eŭropo, sed Zamenhof ne volis ĝin lingve hind-eŭropa. Zamenhof mem, ne mi, skribis en la *Unua Libro*, represita en la *Fundamenta Krestomatio*, 12-a eldono, paĝo 248, la jenon: „Mi aranĝis

plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn...” [ekzemple mal-san-ul-ej-o] „ ... Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj alkutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alikonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel, ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traleginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), – li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia gepatra lingvo.”

Sciencaj esploroj pri la funkciado de E-o en la praktiko diras la samon. Uzante la mezurilojn de GREENBERGER (usona lingvisto) pri la speco de lingvoj oni provis analizi E-on kaj la rezulto estas, ke Esperanto NE APARTENAS NUR AL UNU TIPO, ke ĝi estas meza inter la tipoj. Se oni rigardas la aferon el la vidpunto de la skalo analiza/malanaliza, ĝi estas en la mezo kaj pli kaj pli moviĝas al la analiza flanko. Ekz. ni havas la vorton „direktoro” kiel fosilion de la komenco de Esperanto, dum nun en similaj situacioj oni uzas „-isto”. Sufiĉas memori pri la eposo de la batalo inter „komputoro” kaj „komputilo”.

Skalo: analiza/malanaliza

*direkti*

*direktisto*

*direktanto*

*direktoro*

Se ni rigardas al la skalo kunmeta/kunfanda (aglutina/fleksia), E-o estas nepre en la flanko kunmeta. Bedaŭrinde homoj, kiel tiu zorganto pri radiaj dissendoj, kiu ne legis la antaŭparolon de la lernolibro, ne scias tion kaj aldonas radikojn. La klasika ekzemplo estas:

Skalo kunmeta/kunfanda

*mal-san-ul-ej-o*

*hospital-o*

Por ankoraŭ pli konvinkiĝi, ni rigardu ĉi tiun malgrandan tabelon:

Itale oni diras pri kelkaj profesioj:	E-e oni diras pri la samaj profesioj:
<i>benzinaio</i>	<i>benzinisto</i>
<i>cassiere</i>	<i>kasisto</i>
<i>musicista</i>	<i>muzikisto</i>
<i>muratore</i>	<i>masonisto</i>

<i>legnaiuolo</i> <i>bancario</i> <i>impiegato</i>	<i>lignisto</i> <i>bank(ofice)isto</i> <i>oficisto</i>
--	--

Ekzistas, tamen, en E-o unu hindeŭropa sistem-elemento: -ĉjo/-njo, la malgrandigaj kaj plibeligaj sufiksoj, kiuj donas:

el *Petro*            *Peĉjo*  
el *Marinella*    *Manjo*.

Sed la kunmeta forto de E-o estas tia, ke oni emas fari vortojn kiel „njo-knabo”, kiu estis antaŭ jaroj uzata por virineca knabo, samseksemulo. Kaj ankaŭ estas hindeŭropa la kunagordo de adjektivoj kaj substantivoj, bela semajno, belaj semajnoj, belan semajnon, belajn semajnojn. Evidente temas pri du facetoj de E-o, kiu tute ne sufiĉas por forviŝi ĝian kunmetan (aglutinan=agluan) bazan karakteron.

Claude PIRON iam observis en „La ĉina: mitoj kaj realo”<sup>1</sup>, ke kelkrilate la strukturo de E-o pli similas tiun de la ĉina ol tiun de eŭropaj lingvoj, tamen multego restas por ĉinoj tre stranga. La simileco ĉefe rilatas al la nevarieco de la lingvaj eroj (morfemoj), al la maniero kombini ilin kaj al la fakto, ke la preciziganta ero ofte antaŭas la precizigatan. Sed la ĉina estas treege pli ekstrema ol E-o tiurilate. Ekz., ĉar relativa propozicio precizigas, ĝi devas, en la ĉina, stari antaŭe. „La libro, kiun mi legis” tradukiĝas per „mi-legis-a (tiu) libro”.

Nur la spiritistaj esperantistoj eble mediume povus demandi Zamenhof pri tio kiom la ŝemida lingvo hebrea, kiun li konis, influis lin dum la kreado de E-o. Sed estas fakto, ke E-o funkcias multe pli simile al la semidaj lingvoj ol al la hindeŭropaj je la struktura nivelo. Ĝi baziĝas sur radiko, kiu estas la koro de la sistemo, kaj ĉirkaŭ tiu aldoniĝas per sufiksoj kaj prefiksoj novaj vortoj kun novaj signifoj deriveblaj de la radiko.

Ni vidu nur unu ekzemplon el la araba.

Radiko KTB en Esperanto redonas la ĝeneralan ideon de „skrib-”.

<i>Kataba</i>	<i>(li skribis) skribi</i>
<i>Kaataba</i>	<i>skribi al iu</i>
<i>Takaataba</i>	<i>korespondi (skribi reciproke al iu)</i>
<i>Inkataba</i>	<i>aboni (enskribiĝi)</i>

<sup>1</sup><http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/china.htm>

<i>Iktataba</i>	<i>esti registrita</i>
<i>Istaktaba</i>	<i>skribigi/peti skribi</i>
<i>Katb</i>	<i>skribado</i>
<i>Kitab</i>	<i>skribaĵo/libro</i>
<i>Kutubiy</i>	<i>librovendisto</i>
<i>Kuttaab</i>	<i>elementa lernejo</i>
<i>Kitabah</i>	<i>skrib-arto</i>
<i>Maktab</i>	<i>skribejo, oficejo</i>
<i>Maktabah</i>	<i>biblioteko</i>
<i>Kaatib</i>	<i>verkisto, skribisto</i>
<i>Muktatib</i>	<i>abonanto</i>
<i>Mukaatib</i>	<i>ĵurnalisto</i>

Vi certe tuj komprenas, ke la semidaj lingvoj uzas tiun sistemon multe pli vaste ol E-o mem. Ĉu tio influis Zamenhofon? Mi ne scias, sed certe li havis la konscion, ke „simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj”<sup>2</sup>.

Aliflanke, se la lernanto tute ne bezonas legi la antaŭparolon de la lernolibro, „kiu por la lernanto estas tute senbezona”<sup>3</sup>, la instruisto ja devas legi ĝin kaj devas konstati kiel funkcias la lingvo kaj devas instrui tion al siaj lernantoj. Nun en la multaj kursoj, kiujn mi havis la okazon ĉeesti, kaj en la multaj lernolibroj, kiujn mi legis, oni apenaŭ instruas pri tio. Oni jes diras, ke el „dom-o” oni povas fari „dom-a” kaj simile, sed oni ne dediĉas unu lecionon al la kunmeta karaktero de Esperanto. Estas kvazaŭ oni provus instrui la araban kaj ne klarigus la sistemon de radikoj kaj de derivitaj vortoj el la sama radiko. Iu ajn instruisto de la araba, kiu farus tion, estus konsiderata almenaŭ stranga.

Instruistoj de E-o normale faras tion, ĉar ili ne volas fortimigi la lernantojn kaj ili ne volas detrui la imagon de la lernantoj, kiuj „eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.”<sup>4</sup> Tio, aliflanke produktas tiujn esperantistojn, kiuj malgraŭ la ekzisto de la radiko „tragedi-” oficialigis la radikon „tragik-”, kaj nun serĉas pretekstojn por distingi la laŭsupoze malsaman signifon de la du vortoj „tragedia” kaj „tragika”. Eble oni ne faru tion en la unua aŭ en la dua

---

<sup>2</sup>Vidu la citaĵon tute en la komenco de ĉi tiu artikolo.

<sup>3</sup>Vidu la citaĵon tute en la komenco de ĉi tiu artikolo.

<sup>4</sup>Vidu la citaĵon tute en la komenco de ĉi tiu artikolo.

leciono, sed oni ja faru ĝin, ĉar post 100 jaroj Esperanto rajtas esti klarigata kiel Esperanto kaj ne kiel dialekto de la franca aŭ de la germana.

Praktike, ni ekiru de la instruado de la 16 reguloj, ne de la gramatiko de niaj naciaj lingvoj. Ne timu esti simpla! Ĉiuj granduloj estis simplaj. Kristo estis simpla, Karl MARX estis simpla, EINSTEIN estis simpla, sed la Plena Analiza Gramatiko ne estas simpla. Konsideru la frazon de PAG: „Tamen ankaŭ en Esperanto ekzistas tri specoj de nominativaj, absolutaj adjektoj: 1. identiga stat-adjekto esprimita per adjekta predikativo....”, kaj tio eble konvinkos vin por la eterneco ne inventi kaj ne uzi gramatikajn terminarojn pensitajn por alispecaj lingvoj, sed ne por E-o! Vi rajtas uzi tiajn terminojn, nur kiam vi estas tute certa, ke viaj lernantoj konas tiujn terminojn.

PMEG estas multe pli bona ol PAG, sed kaŝu ĝin de viaj lernantoj almenaŭ en la unua kurso.

## 2. La vorttrezoro instruenda

Se de la strukturo ni moviĝas al la vorttrezoro, mia rekomendo estas pli-malpli la sama; estu simpla! Unue ni konsideru ankoraŭ unu fojon la koncepton „Baza didaktika minimumo” aŭ „baza instrua minimumo” por tiuj, kiuj ne parolas greke. Pri ĝi parolas Josef DÖR, sekvanto de SZERDAHELYI kaj metod(ik)isto pri instruado de lingvoj<sup>5</sup>. Laŭ li, SZERDAHELYI dividas la E-morfemojn tiel:

1. unuelementaj vortoj - 103
2. afiksoj – 40
3. finaĵoj – 17
4. tabel-vortoj – 45

Tiuj 205 morfemoj apartenas al la baza instrua minimumo. Estas evidente, ke en la 103 unuelementaj vortoj estas ĉiuj prepozicioj, konjunkcioj, unuelementaj adverboj ktp. Do se oni instruas tion, kion signifas kaj kiel funkcias tiuj 205 elementoj, oni praktike instruis la tutan gramatikon de E-o. La cetero estas nur vort-trezoro. Kompreneble ankaŭ la vorttrezoro prezentas grandajn problemojn, kiujn ĝenerale oni subtaksas.

Kiujn vortojn oni instruu kaj kiom da ili?

---

<sup>5</sup> Joseph DÖR (2008), *Baza radikaro de Esperanto instru- kaj komunikcele*, Quierschied: Eldonejferlag.

La unuaj vortoj, kiuj venas al mia menso estas la 1000 vortoj de la facilaj listoj de Kontakto troveblaj en pluraj retaj ejoj ankaŭ en [www.edukado.net](http://www.edukado.net) en <http://www.esperanto.org/stanford/vortaroj/> aŭ en <http://remush.be/tezauro/Kontakto.html>.

Alia fonto por trovi vortojn instruendajn povas esti la listo de fundamentaj kaj oficialaj radikoj, kiun oni trovas en la paĝaro de la Akademio en <http://www.akademio-de-esperanto.org/> kaj pli precize en la sekcio *Akademia vortaro*.

Kroma fonto por bona listo de vortoj por komencantoj estas la vortolisto de la tiel nomata „Zagreba metodo”, kies aŭtoroj estis Zlatko TIŠLJAR, Spomenka ŠTIMEC, Ivica ŠPOLJAREC, Roger IMBERT, kaj kiu baziĝas sur la esploro pri la ofteco de morfemoj en la parolata lingvo siatempe farita de Zlatko TIŠLJAR.<sup>6</sup> Sed ankaŭ „Gerda malaperis” de Claude PIRON havas tre bonan liston de uzindaj vortoj<sup>7</sup>.

Multaj el ĉi tiuj listoj havas la problemon, ke ili estas malnovaj kaj ke kelkaj modernaj vortoj estas nepre aldonindaj, ekzemple tiuj, kiuj rilatas al komputiloj. Oni ne povas sekvi retan kurson sen la vortoj „komputilo”, „reto”, „ekrano”, „muso” kaj similaj. Ĝuste tiucele la listo de Kontakto estas nun reviziata de ĝia unua aŭtorino, Anna LOWENSTEIN, kaj ĝi aperos kiel eble plej baldaŭ almenaŭ en <http://www.bonalingvo.org/index.php/Anna>.

Sed kiom da vortoj oni instruu?

Fakuloj pri instruado de naciaj lingvoj konsentas ke ne estas eble instrui ĉiujn vortojn, kiujn la lernanto bezonas.<sup>8</sup> Kvankam en Esperanto la problemo ne estas tiel peza ĝuste pro la kunmeta karaktero de la lingvo, ĝi tamen ekzistas.

---

<sup>6</sup>La kurso nun troviĝas en la reto en <http://eo.lernu.net/kursoj/zm/index.php>, kiu enhavas la vortolistojn por ĉiu el la 12 lecionoj.

<sup>7</sup>La kurso *Gerda malaperis* estas trovebla en multegaj retaj ejoj. Ni indikas ĉi tiun, kiu havas tre klaran tabelon de la vortolistoj de ĉiu leciono:  
<http://bernd.wechner.info/Esperanto/gerda.html>

<sup>8</sup>It is unlikely that teachers can cover in class the huge number of vocabulary items that students will need to use or understand. En Jeanne MCCARTEN (2007), *Teaching Vocabulary – Lessons from the Corpus, Lessons for the Classroom*, Cambridge: Cambridge University Press, pag. 1.



Unue, la instruado de la 205 morfemoj de la „baza instrua minimumo” prenas pli da tempo ol la instruado de simplaj vortoj. En absolute bazaj kursoj de unu semajno, ekzemple, oni komencis forigi la instruadon de la tabel-vortoj malpli oftaj kaj de sufiksoj ne taksataj tro utilaj (-ing- estas la tipa ekzemplo). Pri la cetera vortrezoro, la kvanto da instrueblaj radikoj dependas de du faktoroj:

- la tempo je dispono
- la gepatra lingvo de la lernantoj

En la tradiciaj kursoj de unu horo semajne dum unu lernojaro (8 monatoj pli-mapli) ŝajnis malverŝajne sukcesi instrui pli ol 300 radikojn fremdajn al la lingvo de la lernantoj. Fakte la dua faktoro (la gepatra lingvo de la lernantoj) estas multe pli grava ol oni supozas. Certe ne estas same malfacile por germano kaj italo lerni la radikon „tag-” aŭ inverse la radikon „libr-”. La malfacilaĵo por ĉinoj lerni E-on ĉefe fontas el la vortrezoro, kiel, cetere, por ni ne-ĉinoj lerni la ĉinan.

Konklude, estu indulgema al viaj lernantoj kaj ne diru: „Vi lernas jam de unu jaro kaj ankoraŭ ne komprenas, kion signifas „fotelo”!” Provu mem lerni la vorton „fotelo” en la ĉina kaj memori ĝin. Kaj ne estu malkontenta pri vi mem! Se viaj lernantoj post unu jaro kapablas uzi la 205 kernajn morfemojn kaj ankoraŭ centon, vi estas sukcesa instruisto. Kaj ĉefe ne forgesu instrui al viaj lernantoj, kiel vere funkcias E-o. Tio helpas ilin ankaŭ ne multe cerbumi pri vortoj kaj mem inventi ilin, ekzemple „kaf-trink-il-o” se ili ne memoras la radikon „tas-”.

## Pri kelkaj malfacilaĵoj en Esperanto \*

de *Wim JANSEN* (Nederlando)

### Enkonduko

Ni ĉiuj scias, ke la facileco aŭ malfacileco de iu lingvo, se entute kaptebla en unu sola difino, dependas de multaj faktoroj lingvaj kaj eksterlingvaj. Por studonto de fremda lingvo, tiu (mal)facileco difinas la nivelon de lernfacileco de tiu lingvo, nomata ankaŭ *lernebleco* laŭ la angla font-

---

\* Mi dankas Hans BAKKER kaj Katalin KOVÁTS pro la disponigo de ĉiuj originalaj materialoj, uzitaj en tiu ĉi kontribuo.

termino. En la lingvistika esplorcentro ACLC de la Universitato de Amsterdamo oni pristudas tiujn aspektojn de la lernebleco, kiuj rilatas al la propraj strukturoj de lingvoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ Esperanto. La teoria kadro, en kiu disvolviĝas tiuj ĉi studoj, estas tiu de la funkcia diskurs-gramatiko, priskribita en Hengeveld kaj Mackenzie (2008)<sup>9</sup>.

Kio estas ‘facila’ aŭ ‘malfacila’ en la gramatiko de Esperanto? Indicon pri tio mi serĉis i.a. en la materialoj de testoj pri Esperanto-lingvoscio, kiuj estas troveblaj en la publikigoj BAKKER kaj PILGER (1967) kaj BAKKER (1974). Temas pri testoj, kies celo estis esplori la lernfacilecon de E-o kaj krei science defendeblan komparilon kun similaj testoj, ekzistantaj por certaj vaste uzataj lingvoj. La testoj estis organizitaj kiel enŝovitaj programeroj en aro da internaciaj esperantistaj kunvenoj inter oktobro 1967 kaj decembro 1969 en Britujo, Francujo, Nederlando, Pollando, kaj la tiamaj Germana Federacia Respubliko kaj Jugoslavio. Oni kolektis respondojn de sume 238 personoj kaj la analizoj de la rezultoj aperis en *Scienca Revuo* (BAKKER 1974).

La testoj celis esplori la *ĝeneralan* lerneblecon de Esperanto kiel bazon por komparo kun aliaj lingvoj, kun atento al prononco, ortografio, gramatiko kaj leksiko en ties kvar tutaj aparte aŭ sume. Tial, la publikigitaj analizoj ne mencias, kiuj *specifaj* rezultoj estis atingitaj en la multaj diversaj areoj, kiuj kune konsistigas la gramatikon. Alivorte, por eltrovi, kiuj aspektoj ene de la gramatiko kaŭzis la plej oftajn erarojn, necesis reanalizi la originalajn dosierojn. Mia intereso estis havi impreson pri la eraremo de la tiamaj partoprenintoj en la kampo de la morfosintakso kaj tiucele mi aparte analizis la koncernajn respondojn de 112 el 238 testitoj.<sup>10</sup> En la rezulta dosiero, du aspektoj de la Esperanta gramatiko kune kaj impone gvidas la oftocoliston de eraroj: la valento de la verboj kaj la uzo de la akuzativo. Ilin tuj sekvas la uzo de la refleksivo.

---

<sup>9</sup> Vidu la bibliografion ĉe la fino de la artikolo.

<sup>10</sup> La funkcia diskurs-gramatiko principe ne distingas inter la morfologio kaj la sintakso, sed konsideras la morfologion sintakso sur vorta kaj subvorta niveloj. Estas tamen nature, referenci al konkretaj vortstrukturaj fenomenoj kiel morfologiaj kaj al frazstrukturaj fenomenoj kiel sintaksaj.

## La populacio

En mia aliro, la fenomeno ‘lernebleco’ estas rekte influata de la t.n. *travidebleco* de la strukturo de lingvo, kiu koncernas la rilaton inter la diversaj priskriboniveloj de lingvo, t.e. la interpersona aŭ pragmatika, la semantika, la morfosintaksa kaj la fonologia niveloj. La baza hipotezo estas, ke ju pli senpera aŭ travidebla iu internivela rilato estas, des pli ĝi faciligas la ellernon de la lingvo el pure lingvostruktura vidpunkto. Ju pli ĝi estas nekontinua aŭ opaka, des pli ĝi malfaciligas la ellernon. Pro mia koncentriĝo al la morfosintakso, mi ne atentis la ĉapitrojn pri la pasiva kupto de la prononco. Pro la sama kialo mi ankaŭ ne konsideris la partojn pri la pasiva kaj aktiva kono de la leksiko. Sume mi elektis 14 morfosintaksajn testdemandojn el totalo de 28 kaj, kiel dirite, trastudis la respondojn de 112 el la 238 testitoj, kiuj estis fintraktitaj en la (tute alicelaj) statistikaj analizoj de Bakker (1974).

La 14 netraktitajn testdemandojn mi eliminis, ĉar laŭ mia juĝo ili nek ŝanĝus la rezultojn signife, nek aldonus alian kromvaloron al ili, se mi konsiderus ĉiujn sendistinge. Mi konsideris la limigon al ĉirkaŭ duono de ĉiuj demandoj sufiĉe reprezenta eltiraĵo por miaj celoj (krom se la rezultoj montriĝus akre kontrastaj kun certaj — ne kvantaj, sed kvalitaj — referencoj, kiuj estas tie kaj tie troveblaj en la literaturo). Ekzakte la duono de la personoj (56) estis submetita al testoj en Okcidenta Eŭropo (Nederlando, Francujo, Germana FR, Britujo), la alia duono (56) en Orienta Eŭropo (Pollando kaj Jugoslavio). La testfolioj ne enketis pri ĉies gepatraj lingvoj, sed nur pri la (ioma) kono de lingvoj (el tiu ‘ioma’ oni povas dedukti ‘negepatraj’). Tio signifas, ke mi deduktis la gepatran lingvon el kombino de la lingvo de la lando, en kiu la testo estis organizita, la nomo de la testito kaj la nemencio de la supozata gepatra lingvo en la listo de iom konataj lingvoj (supozataj fremdaj). Tamen, en preskaŭ ĉiuj kazoj de la testitoj en Jugoslavio mi povis noti nur ‘jugoslavian’ kiel gepatran lingvon, ĉar pli fajna diveno estis neebla (preskaŭ neniu menciis la serban, serbokroatan aŭ kroatan, aŭ iun alian konkretan jugoslavian lingvon). Kun tiu ĉi rezervo, por ĉirkaŭ la duono de ĉiuj testitoj mi trovis iun ĝermanan-latinidan lingvon kiel la gepatran, por la alia proksimuma duono iun slavan. Troviĝas unu albanlingva kaj du hungarlingvaj testitoj en mia listo. La (ioma) kono de fremdaj lingvoj estis ĉefe dividita inter la angla, franca kaj germana (se tiuj ne estis dedukteblaj kiel gepatraj lingvoj) kun neneglektinda kono de la rusa en Pollando (nur apenaŭ en Jugoslavio).

La aritmetike averaĝa aĝo de ĉiuj testitoj estis 35 jaroj, la norma devio ĉirkaŭ la averaĝo: 16. La okcidenta grupo (kun averaĝa aĝo de 29 kaj norma devio de 12 jaroj) estis pli juna kaj pli aĝ-kompakta ol la orienta (kun averaĝa aĝo de 41 kaj norma devio de 17 jaroj). La nombron da horoj dediĉitaj al la studado kaj aplikado de Esperanto mi notis, sed ne uzis en tiu ĉi laboro; ili restas uzeblaj por konsulti individuajn testitojn en la okazoj de drasta devio de la normo, ekz-e por esplori la eventualan influon de iu gepatra lingvo aŭ de tre malalta stud- aŭ aplikonivelo. La 112 testitoj donis entute 1535 validajn respondojn al la 14 demandoj (el teoria maksimumo de  $112 \times 14 = 1568$ ). Tio signifas, ke nur 2,1% de la demandoj restis nerisponditaj pro nescio, hezito aŭ eventuale manko de tempo. Oni do montriĝis tre certa pri si mem. Tiom pri la populacio esplorita laŭ la kriterio de la morfosintakso.

### Analizo de eraroj

La eraroj faritaj de la testitoj estas metebblaj sur skalon de ‘pli ofta’ al ‘malpli ofta’, kiun reprezentas la linioj de supre suben en tabelo 1. ‘Demando’ en la maldekstra kolumno resendas al la originalaj kodoj de la testdemandoj F21, F15 ktp. La kolumno ‘Erarproc.’ enhavas la procentaĵon da eraraj respondoj el la entuta nombro da validaj respondoj al la koncerna demando):

Tabelo 1: Relativa ofteco de eraroj

Demando	Erarproc.	Temo de la koncerna testdemando
F21	55,1	Rekono de la valento de la verbo <i>balanci</i> .
F15	38,8	Elekto de la akuzativo post <i>kiel</i> .
F3	37,5	Rekono de la valento de la verbo <i>komenci</i> .
C3	37,0	Uzo de la direkta akuzativo.
F4	36,7	Elekto de la valento de la verbigita radiko <i>fam-</i> .
F8	35,8	Uzo de neakuzativa tempa adjekto kun prepozicio.
F7	34,8	Uzo de akuzativa tempa adjekto sen prepozicio.
C7	31,8	Kompreno de <i>sia</i> aŭ <i>ŝia</i> .
F2	29,5	Uzo de la volitivo.
F6	25,9	Elekto de la bezonata prepozicio.
F17	23,4	Uzo de adverba predikato en <i>Estas varme</i> .
F18	22,0	Uzo de sensubjekta frazo en <i>Pluvas</i> .
F1	13,5	Elekto de la subfrazo tenso en <i>...promesis, ke -os</i> .
C8	11,8	Uzo de <i>po</i> .

Montriĝas, ke la verba valento kaj la akuzativo en iu formo estas la fontoj de la plej oftaj eraroj. Sepope, la dutemaj eraroj okupas la supran duonon de la listo de F21 ĝis F7. La rezulto konfirmas aliajn — tamen kaj bedaŭrinde nur fragmentajn — esplorojn pri la lernfacileco de Esperanto. Bona, sed intertempe tre aĝa referenco estas la nederlandlingva doktoriga disertacio *Vijf Kunsttalen* ‘Kvin Artefaritaj Lingvoj’ verkita de Willem Manders, kiu sobre, sed kritike raportas pri la malfacileco de la verba valento kaj de la akuzativo (Manders 1947: 165-167 kaj 224-232). Pri la valento relegindas ankaŭ la artikoleto de Bernard Golden *Neinstruebla, nelernebla gramatikaĵo?* (Golden 1988). La trian lokon inter la erarfontoj okupas la refleksivo, malbonŝance adresita en nur unu testdemando (C7). Ankaŭ ĝi, almenaŭ ĝia poseda formo *sia*, estas delonge konata stumbligilo (Manders 1947: 254).

Ĉu estas hazardo, ke ĝuste la tri supre trovitaj fontoj, valento, akuzativo kaj refleksivo, kulpas pri pli ol duono de la sume faritaj eraroj en la testoj? Ĉu pli granda nombro da partoprenantoj kun pli granda lingva diverseco rezultigus tre malsaman distribuon de la erarfontoj? Mia hipotezo estas, ke al ambaŭ demandoj ni ricevus nean respondon, ĉar la tri erarfontoj estas *strukturaj* malfacilaĵoj. En la tri kazoj temas pri opaka rilato inter la semantiko kaj la morfosintakso.

Ni prenu la verban valenton. Kiam, deirante de la ekzempla frazo *la bruado ĉesas*, oni ŝanĝas la predikatan strukturon de unumembra al dumembra en *mi ĉesigas la bruadon*, la aldono de *mi* sur la interpersona nivelo kaj la atribuo de la roloj Aganto al *mi* kaj Priagato al *bruadon* sur la semantika nivelo sufiĉas por determini la kernan verbon de la predikato transitiva. Sed Esperanto postulas la aldonon de morfologia konfirmilo de tio per la transitiviga sufikso *-ig*, alkoĉenda al la radiko *ĉes-*, ĉar tiu ĉi lasta estas dekretita netransitiva. Similaĵo okazas, kiel konate, kiam devige aldonendas la sufikso *-iĝ* al transitiva radiko, kiam tiu ĉi aplikiĝas ne en sia hejma medio (dumembra predikato), sed en unumembra predikato. Pri la akuzativo eblas diri jenon. Laŭ la tradicia ekspliko, la akuzativa finaĵo *-n* aplikiĝas al la suferanto de la ago, la semantike difinita priagato P, sed verdire nur, kiam ĝi estas ankaŭ la sintaksa objekto O (*mi legas la libron<sub>P,O</sub>*), ne kiam la priagato rolas kiel la subjekto S (en ekz-e *la libro<sub>P,S</sub> estas legata de mi*). Ankaŭ ĉi tie intervenas la morfosintakso sen semantika pravigo. Kaj koncerne la trian erarfonton, la refleksivon, sufiĉas rememorigi pri la ekzemplo, ke *sia* estas uzata en *li kun sia frato*, sed ne en

*li kaj lia frato*, ĉar en la dua vortgrupo (semantike absolute identa al la unua), la sama persono (*frato*) estas parto de la sintaksa subjekto. En ĉiuj tri kazoj ni konstatas nekontinuan aŭ opakitan rilaton inter la semantika formulado kaj la morfosintaksa kodigo de la komunika intenco, kiun ni povus deklari kulpa pri la konsekvenca relativa malfacileco de nia lingvo ĉi-rilate.

### **Pri la plu-uzeblo de la materialo**

En la originala materialo, kiun mi esploris, estis trovebla nenia detala priskribo de la cirkonstancoj, en kiuj la testoj estis organizitaj, ekz-e pri la kiamo (ĉu tage, antaŭ- aŭ posttagmeze, vespere); pri la daŭro kaj la enŝovo aŭ ne de paŭzoj; pri la ejo (ĉu libere alirebla, fermita, (sen)brua, (mal)luma ktp); pri la demando, ĉu ĉiuj testitoj samtempe pasis aŭ ĉu, ekz-e dum tutsemajna seminario, ili pasis pogrupo aŭ eĉ individue. Tio principe subfosas la kompareblon inter la dosieroj de la diversaj sesioj, kiu ja dependas de rigora identeco, aŭ almenaŭ konateco, de ĉiuj influaj faktoroj. Ankaŭ ne troveblis raporto de la malsamaj respondeculoj en la diversaj sesioj pri tio, ĉu la instrukcioj estis idente interpretitaj kaj klarigitaj (la skribaj instrukcioj montriĝas tre zorge kompilitaj). Kiel jam dirite, mankas unusencaj informoj pri la gepatra lingvo de ĉiu testito, kaj mankas ankaŭ eksplicita konfirmo pri ies eventuala denaska esperantisteco. Pro la limigita celo de mia ĉi-supre raportita enkonduka esploro ĉio tio ne vere gravas.

La materialo, malgraŭ sia aĝo, montriĝis bone uzebla por konfirmi kelkajn ĝeneralajn eldirojn pri certaj malfacilaj aspektoj de la Esperanta gramatiko, kiujn oni trovas en nia prilingva literaturo. En la intereso de efika instruado de nia lingvo, pli funda esplorado ĝuste pri tiaj malfacilaĵoj estus tre dezirinda.

### **Bibliografio**

Bakker, Hans kaj Wouter Pilger. 1967. *Le problème linguistique dans les relations internationales de la jeunesse / The language problem in international youth relations*. Amsterdamo: TEJO.

Bakker, Hans. 1974. 'Testo pri Esperanto-lingvoscio' en *Scienca Revuo* 25, 2/3 (106/7): 103-121.

Golden, Bernard. 1988. 'Neinstruebla, nelernebla gramatikaĵo?' en *Esperanto* 995 (11): 188-189.

Hengeveld, Kees kaj J. Lachlan Mackenzie. 2008. *Functional Discourse Grammar*. Oksfordo: Oxford University Press.

Manders, Willem. 1947. *Vijf Kunsttalen*. Purmerend: Muusses.

## MIAJ SPERTOJ PRI LINGVOJ

de *Rudi KOOT* (Nederlando)



Mi naskiĝis en 1964, mi estas 47-jara kaj loĝas en Nederlando. Mi studis ekonomion kaj nun laboras kiel oficisto en urbodomo. Mi registras leterojn en la komputilo kaj faras dosierojn por la arkivo.

La afrikansan mi regas nur pasive. Mi povas bone legi tekstojn kaj kompreni iun, se tiu persono parolas klare kaj malrapide. La afrikansa ege similas la nederlandan. Mi lernis la germanan en la mezlernejo (1976-1982). Tiam estis sur la televido nur du nederlandaj kaj tri germanaj kanaloj. Do, ni ofte rigardis germanajn televid-programojn. Mia patrino helpis min, kiam mi ne komprenis ion. Mi nun bone komprenas la germanan. Mi povas ankaŭ sufiĉe bone paroli kaj skribi la germanan. Mi lernis ankaŭ la anglan en la mezlernejo. En Nederlando anglalingvaj filmoj estas subtitolitaj en la nederlanda. Ankaŭ estas multaj anglaj kantoj en la radio.

La francan mi ne ŝatis en la mezlernejo. Post la devigaj jaroj mi tuj ĉesis lerni la francan. La lingvo ne estis facila por mi kaj mi ne ŝatis la instruistojn. Sed post kiam mi pasigis miajn feriojn en Valonio kaj Francio mi denove lernis la francan per vespera kurso kaj memlernado. Nun mi povas bone legi turismajn kaj ne tro komplikajn tekstojn. Por turismaj celoj mi povas bone esprimi min. Sed aŭskulti radioprogramojn aŭ diskuti ofte estas tro komplike por mi.

Ekde 2004 mi lernas la rusan lingvon. Mi rigardis kurson pri la rusa lingvo en la germana televido kaj ekde tiam mi volis lerni la lingvon. Mi ĉefe lernis per popoluniversitato (edukado por plenkreskuloj) kaj memlernado. Nun, post sep jaroj, mi havas la senton, ke mi havas bazon de la rusa lingvo. Ekster tiu bazo estas malfacile. La komplika gramatiko (la neregulaĵoj) kaj la limigita vorttrezoro (ne ofte uzatajn vortojn oni malfacile memoras) estas grandaj obstakloj. Mi ne scias, ĉu mi iam sukcesos regi la rusan. Sed mi volonte kapablus legi kaj kompreni la rusan.

En 2001 mi lernis E-on per interretkurso kaj tri nederlandaj lernolibroj. Ankaŭ studsemajnfinoj kaj kunvenoj multe helpis. En 2010 mi instruis dum studsemajnfino kaj en 2011 mi instruis 10 lecionojn al infanoj kun granda intelekto. Por mia laboro mi nur unufoje uzis la anglan lingvon. En la komenco de la naŭdekaj jaroj nia nederlanda municipo Cromstrijen havis ĝemelligon kun la pola municipo Olsztyn. Foje poloj vizitis nin por paroli pri diversaj temoj. La komunikado estis malfacila. Kaj paroli pri faka temo kiel kloakaro estis eĉ pli malfacile. Estus bone koni plurajn lingvojn. Sed ju pli mi aĝas des pli mi estas konvinkita, ke oni (almenaŭ mi kaj, mi supozas, plejparto de la homoj) nur povas bone regi unu fremdan lingvon. Per „bone regi” mi celas diri „preskaŭ tiel bone kiel la denaskan lingvon”. Laŭ mi, por tiu celo neniu lingvo taŭgas tiel bone kiel E-o, pro siaj relativaj facileco, reguleco kaj neŭtraleco.

## LIBRO-RECENZO

*La Multiplika Ĉapelo, Lieke Wagemaker, trad. Roel Haverman. Eld. De Trompet, Nederlando, 2011. ISBN: 9789081841504. Prezo ĉe UEA: € 3,60.*



Jen agrabla legolibreto el Nederlando sur nur 16 paĝoj, el kiuj ĉ. 10 havas tekston, kiu aperas en klara litertipo kaj adekvata grandeco. La ceteraj paĝoj dediĉiĝas al bildoj, la plimulto plenkoloraj kaj kelkaj plenpaĝaj. La rakonto okazas en Suda Altlando, kie unu urbestro havas problemojn pavimi la stratojn. Feliĉe, alia urbestro proponas solvon, en la formo de multiplika ĉapelo. La lingvaĵo estas bona, sed ne simpligita – ĝi enhavas eĉ bele skulptitajn sed foje kompleksajn

frazojn. Aldone al la livero de ĉarma rakonto, ĝi prezentas la esencon de multiplikado – ja kun simplaj ekzemploj de ĝia praktika utileco. Do, la celgrupo estas infanoj ekde 8-jaraj, ĉar la konsumantoj devas kapabli je



baza aritmetiko. La libro egale taŭgas por laŭtlegado flanke de mentoro aŭ memlegado. Librofine estas alvoko por senlimdata desegno-konkurso.

*smg*

## Instruante en Afriko (II.)

*En aprilo 2011 Mirejo GROSJEAN restadis en Burundo kaj instruis en Rumonge. La unua parto de ŝia raporto aperis en IPR 2011/3. Jen la dua parto. – NdlR*

### SITUACIO KREAS BEZONON

En aprilo 2011 mi estis en Burundo. Mi instruis tie al pli ol 40 junuloj (preskaŭ ĉiuj burundanoj estas junuloj...) kaj okazigis ekzamensesion (tradiciajn ekzamenojn de ILEI/UEA).

Kiel devas esti en Afriko, la organizado de la kurso inkluzivis manĝojn.

Kiel mi kutimas fari, mi manĝis kun la gestudentoj.

Kiel kutime ili ricevis matene fazeolojn kun krespoj, tagmeze fazeolojn kun manioko kaj vespere fazeolojn kun rizo.

Ĉu ili partoprenis la kurson por ion lerni, por ion manĝi, por ricevi atestilon post sukceso en ekzameno, tio ne klaras kaj tio ne devas esti klarigita.

Dum la matenmanĝo venis teo, bonega teo. Teamo venis kun la manĝaĵo kaj du junulinoj servis la grupon. Iun matenon mi prenis la tepoton el la manoj de la junulino kaj mem verŝis la teon en la tasojn de la gestudentoj. Ekplodis atentema silento... Kio okazas?? Ĉiuj ĉesis paroli... tute ne normala situacio, surprizo, ŝoko... Blankulo servas nigrulon! Tio neniam okazas!

Komento venis: „Vi fierigas nin!” Estis kortuŝa momento. Mi devis klarigi, ke por mi estas tute normala situacio kaj ago.

Mi miris pri tiu frazo. Mi estas konvinkita, ke tiu burundano, kiu diris tion, neniam antaŭe uzis la verbon „fierigi”. En tia situacio li bezonis ĝin, kreis ĝin. Tio estas la miraklo de nia lingvo. La genia konstruo, interna logiko de la lingvo ebligas tion. Oni kreas la bezonatan vorton laŭplaĉe.

Claude Piron diris: Kiam oni uzas E-on, oni estas aparte feliĉa, ĉar la du cerbopartoj, la logika kaj la kreema, laboras plej harmonie.

## ĈU TIO NOMIĜAS LIBRO?

Ĝi estis ĉerande faldita. La inko ne estis nigra sed griza. La paĝoj jenis: 4, 5, 6, 23, 24, 25, 8, 9, 10... Mi ne kontrolis, ĉu ĉiuj paĝoj ekzistas en tiu libro. Temis pri lernolibro pri Esperanto. La posedanto de ĝi bonege parolis kaj skribis E-on. Kia miraklo!! La posedanto legis ĝin plurfoje, kvazaŭ parkerigis ĝin. La eldonjaro estis proks. 1920... Do se ni el Eŭropo sendas lernolibrojn al Afriko, tio ne estas lukso. Tio nepras!!!

Dum la ekzamensesio okazis parola parto. Estas demandoj pri ĉiutaga vivo, estas demandoj pri E-kulturo, agado, uzado, kaj estas priskribo de bildoj. Mi havas kolekton da bildoj, ĉu desegnaĵoj, ĉu fotoj. La kandidato ricevas bildon, li aŭ ŝi devas diri tion, kion li vidas, devas supozi, kio okazas sur la bildo kaj devas iel diri, ĉu li mem praktikas tiun aktivadon, ŝatas aŭ ne ŝatas tion. Miaj bildoj estas ĉiam iel amuzaj, nenormalaj. En Burundo, iu kandidato demandis al mi fine de la ekzameno: „Ĉu mi povas ricevi la foton?” Unue mi miris. Poste mi komprenis. Ĉe mi en Svislando, mi facile trovas tiajn bildojn en iuj revuoj, gazetoj, ĉu ĵurnaloj, ĉu en revuoj en atendejo ĉe kuracisto, foje en aviadilo... De tie mi kutimas ŝteli originalajn fotojn... mi pardonpetas... En Afriko, revuoj ne ekzistas en iuj atendejoj... do ŝajnas, ke tiaj fotoj estas ŝatataj por ornami ĉambron. Do, se ni el Eŭropo sendas librojn, revuojn al Afriko, tio ne estas lukso. Tio nepras!!!

## ĈU SKOLO, ĈU LERNEJO?

La kandidato tre aplombe diris: la studento iras al la skolo. La ekzamenantoj protestis, korektis. La studento klopodis pravigi sin dirante: „En mia vortaro mi povas legi: skolo = école”. Ecole estas franca vorto kun du signifoj: lern-ejo kaj skolo. (Skolo laŭ PIV estas: „Tuto de la disĉiploj de filozofo, verkisto, artisto, sciencisto ktp, kiun ili rigardas kiel sian majstron; aro aŭ sinsekvo de adeptoj de la sama doktrino, principo aŭ afero...”)

En afrikaj landoj jam vortaro estas lukso, kompreneble ofte nur poŝvortaro disponeblas. En multaj landoj ne ekzistas PIV. Do en tiuj poŝvortaroj ne estas klarigoj, ne estas ekzemploj, nur estas: vorto en lingvo A = vorto en lingvo B. Konsekvence tiu kandidato fidele kaj diligente lernis por lern-ejo la vorton skolo. Kiam ni laŭlegis la difinon de la vorto skolo en PIV, li ekmiris. Neniam li aŭdis pri tiu vorto. Li bonege komprenis la signifon kaj certe li memoros tiujn du vortojn por la franca vorto *école* por ĉiam!

Tiaj problemoj naskiĝas, kiam lernantoj, studentoj havas je dispono nur limigitan nombron da lerniloj. Do, se ni el Eŭropo sendas lernolibrojn, vortarojn al Afriko, tio ne estas lukso. Tio nepras!!!

*Mirejo GROSJEAN (Svislando)*

## El la landoj kaj sekcioj

### Ĉinio

Je la komenco de marto la Profesia Artkolegio de Kunming okazigas du E-kursojn kiel prepara laboro por la 45-a ILEI-konferenco, kiu sekvos ĉi-julie en la sama loko. La kursoj daŭras minimume 4 monatojn. Invitite de la Artkolegio s-ro WANG Minhao unue plenumas la instruadon. La unua kurso dufoje en semajno okazas por gestudentoj de la fremdlingva fakultato. La alia okazas unufoje semajne por gekantistoj de la Ĥoro Nie Er, kiuj prezentos en la konferenco. La gelernantoj de Esperanto esprimas grandan intereson al la lingvo kaj diligente lernas ĝin.

*raportis: WANG Minhao*

### Finnlando

Komence de la jaro 2012 aperis 109-paĝa historio de la 90-jara Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI), verkita de la sekciestro Sylvia HÄMÄLÄINEN kaj enhavanta mallongajn finnan kaj svedan resumojn.

ELFI, fondita en 1921, aliĝis al ILEI en 1950, tuj post ties fondiĝo (1949). Komence la membraro nombris 20. En la plej fortaj jaroj 1948-1978 la membronombro variis inter 50 kaj 72. Nun ELFI havas 20 membrojn.

La laboro kaj atingoj de ELFI neapartigeble ligiĝas kun ILEI, kun la laboro de finnlandaj UEA-anoj kaj aktivaj grupoj dise en la lando. Nenion ELFI sola povas atingi, ĝi povas nur disponigi oficialan agadkampon por aktivuloj kaj ideistoj, kunigante fortojn kaj iniciatojn, konsilante, informante.

Ekzemploj el la aktuala agado: ELFI-anoj Teuvo ALAVILLAMO kaj Tapani AARNE kompilas la vortaron de *lernu!*, tradukas informojn por E@I, gvidas lernantojn de la kurso Ana Pana kaj krome Tapani AARNE prizorgas la hejmpaĝon [www.esperanto.fi/elfi](http://www.esperanto.fi/elfi). La membro Tuomo GRUNDSTRÖM reprezentos E-on, kaj la organizaĵojn ILEI kaj ELFI en la monda kongreso

de lingvoinstruistoj (FIPLV) en Helsinki en junio 2012. UEA disponigos €200 por nacilingvaj informiloj por disdoni en tiu evento, kiu okazas nur ĉiun trian jaron. Pluraj membroj instruas, informas, laŭ siaj ebloj.

En sia libro S. HÄMÄLÄINEN priskribas la multflankan kaj ofte malfacilan laboron en la pasintaj naŭ jardekoj. Ŝi detale raportas pri kunsidoj, decidoj, instruado en lernejoj kaj institutoj, pri gastinstruistoj kaj lerniloj aperintaj en Finnlando. Ŝi substrekas, ke gravas prizorgi kaj gardi ĉiujn dokumentojn de la sekcio, sekvi la realiĝon de la ĉiujaraj agadplanoj. Ne havinte sekurejon, kie stoki la dokumentojn, ELFI diveneble perdis parton el ili, kio malfaciligis la kompiladon de la historio. Nun jam tio ŝanĝiĝas kaj ELFI rajtas uzi la stokejon de EAF.

La verkado de la libro estis granda kaj temporaba defio. La verkinto elektis kiel nomon kaj moton por la libro la famajn liniojn de L. L. Z.: „Ni semas kaj semas...”. Centoj, miloj da semoj perdiĝis, sed kelkaj ekĝermis kaj kreskas. Pri ili ni ĝoju.

La prezidanto de ILEI solene akceptis la verkon de ELFI-membro Synnöve MYNTTINEN en la Malferma Tago de la Centra Oficejo, fine de aprilo.

*Raita PYHÄLÄ*

## **Francio**

### **Somera programo en la franca Esperanto-kastelo Greziljono**

Estos 4 laŭtemaj semajnoj (resumo interrete: [gresillon.org/somero](http://gresillon.org/somero)):

- julio-21/28: Art-amatora semajno kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj. Informoj interrete: [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)
- julio-28/aŭgusto-04: Alternativa semajno kun verd-politika seminario kaj E-kursoj; por vegetaranoj, verduloj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, naturistoj kaj tendumantoj. Informoj interrete: [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)
- aŭgusto-04/11: Turisma kultura semajno, kursoj de la franca lingvo kaj E-o antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe la rivero Luaro posttagmeze. Informoj interrete: [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)
- aŭgusto-11/20: Pupteatra festivalo por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj. Informoj interrete: [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)

Kontaktoj: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), +33-241 89 10 34, [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org).

Adreso: Gresillon, FR-49150 Saint Martin D'arce, Francio.

Jara agendo: [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo).

## Novajoj de edukado.net

Edukado.net fariĝis 10-jara fine de la jaro 2011. Okaze de tiu jubileo la preskaŭ 2500-persona membraro multnombre salutis kaj per ĉ. 4000-eŭra mondonaco plie subtenis la paĝaron.

El la multaj funkcioj de la retejo ni atentigas vin pri la sekvaj sekcioj:

- **KURSOJ:** estas loko por anonci la movadajn kaj lerneajn kursojn kun celo havigi mondan trarigardon pri la situacio de la instruado de Esperanto
- **STATISTIKO:** tie eblas vidi kun koloraj grafikaĵoj multajn flankojn de la enhavo de la paĝaro, inklude informojn ankaŭ pri la instruado de E-o.
- **FOTOALBUMO** (sub la **BIBLIOTEKO**) estas nova sekcio de la retejo, kiun eblas riĉigi per fotoj en diversaj kategorioj, ekz. sendado de grupfotoj aŭ raportoj pri aranĝoj. Alia tre populara temo de tiu sekcio estas la jam 50-era bilda prezento de Falsaj Amikoj, materialo tre bone uzebla dum la instruado.
- En la **KORESPONDA SERVO** (sub la **KOMUNUMO**) eblas trovi kaj loki individuajn kaj grupajn anoncojn.
- La **FORUMO** kun centoj da diversaj fadenoj donas eblon por diskutoj, kleriĝo, kunlaboro kaj anoncoj de la membroj.
- La **KLERIGEJO** de la paĝaro estas unu el la plej ofte uzataj partoj de la retejo. La **Retan Instruistan Trejnadon ĉe Edukado.net** (**RITE**) sekvas jam 30 kursanoj el 14 landoj, kaj pluraj el ili proksimiĝas al la mezo de sia 100-leciana kursaro. Aliĝu ankaŭ vi. Stipendioj riceveblas.
- Kadre de la **KLERIGEJO** estis lanĉita ankaŭ pluraj aliaj kursoj, inter ili reta preparkurso kun la titolo *Kultura vojaĝo al Vjetnamio*. La 20-leciana materialo, pretigita de s-ro Nguyen Xuan Thu kaj Katalin Kováts, provlegita de Mogens Rude Andersen kaj Mónica Molnár, ne nur al la kongresanoj estos utila orientilo, sed sekveblas al kiu ajn, kiu pere de Esperanto volas lerni pri aliaj kulturo kaj mondo.
- **EKZAMENOJ:** Edukado.net fariĝis la centro ankaŭ de la **KER**-ekzamenoj. Sub la koncerna sekcio lokiĝas ĉiuj informoj, ekzamen-specimenoj, listo kaj aliĝiloj al la proksimaj sesioj.


- Por la plej aktulala ekzamenkampanjo, TUTMONDA SKRIBA sesio, okazonta en 29 lokoj de 17 landoj la 9an de junio 2012 aliĝis jam pli ol 380 kandidatoj.

Vizitu kaj profitu el la riĉaj materialo kaj ebloj de [www.edukado.net](http://www.edukado.net).

## Forpasoj...

### Josef Ŝemer (1950-2012) – Israelo

Josef (Josi) Ŝemer mortis la 29-an de marto en Tel-Avivo, pro komplikiĝo post operacia. Sur lia tomboŝtono estas gravurita „Koro de la Israela E-movado, amata tra la tuta mondo”, frazo kiu fidele priskribas lian E-vivon. Dum preskaŭ duona jarcento li estis piliero de E-Ligo en Israelo, kaj samtempe konata kaj ŝatata internacie, aparte pro la „judaj ŝercoj” kiujn li sendadis regule al centoj da abonantoj de lia retlisto „amantoj de juda humuraĵo”. Profesie li estis instruanto pri fremda valuto en granda banko en Tel Avivo. Li lernis E-on en 1966 ĉe la pola-israela aktivulo Isaj DRATWER, pro instigo de sia patro, kiu naskiĝis en Bialistoko. Jam en 1967



li partoprenis la 23-an IJK-on, parte okazintan en Netanja. En la sepdekaj jaroj li aktivis en la junulara movado en Israelo, kiun li prezidis en la jaroj 1982-1986, kaj kunorganizis la 42-an IJK-on en Neurim (1986). Dum du jardekoj li redaktis la organon de ELI, „Israela Esperantisto” (1981-2001, sed helpredaktis jam kelkajn jarojn pli frue). Ekde 1975 li estis delegito de UEA – unue JD, poste FD (pri bankaj aferoj) kaj ekde 1989 ankaŭ Delegito de Tel-Avivo. Ekde 1993 ĝis sia morto li estis kasisto de ELI, ekde 1999 ankaŭ ĝia sekretario, kaj en 2001-2008 ĝia prezidanto. De 1995 li estis DM, en 1999-2007 – komitatano A de Israelo kaj ekde 2008 – membro de Societo



Zamenhof. Lia plej ŝatata kaj intensa agado estis la organizado de la Tel-Aviva E-klubo, kiun li sindone kaj ame gvidis ĉiun mardon, ĝis sia enhospitaligo en januaro 2012. Ekde la 61-a UK en Ateno Josi partoprenis preskaŭ ĉiujn kongresojn kaj estis sekretario de la LKK de la 85-a UK en Tel-Avivo (2000). Li akiris multajn geamikojn, kiuj aprezis lian amikemon kaj humuron. Li ofte (lastfoje en la UK en Havano, en 2010) prelegadis pri judaj temoj, kiel la hebrea lingvo kaj juda humuro kaj liaj prelegoj estis tre popularaj kaj aprezataj. En januaro 2012 li sendis la lastan mesaĝon al sia retlisto „amantoj de juda humuraĵo”, dirante „En la venontaj semajnoj (eble eĉ monatoj) mi ne povos dissendi la judajn ŝercojn. Espereble la paŭzo ne estos tre longa...”. Bedaŭrinde li ne sukcesis efektiviĝi sian revon eldoni la centojn da judaj ŝercoj kiujn li dissendis. Tamen, ELI planas eldoni ilin libroforme, por memori lin en maniero kiun li verŝajne konsiderus plej taŭga: per agado por Esperanto.

*Amri WANDEL (Israelo)*

Li estis tiom ŝercema, ke ĉiuj miaj rememoroj pri li estas amuzaj kaj gajaj. Li estis tre alta kaj ofte ŝercis pri sia alteco, i.a. dirante ŝercojn pri ĝirafoj. Foje li demandis: „Ĉu vi scias, kial ĝirafoj ĉiam havas kolegojn?” La respondo estis, ke la koloj de ĝirafoj estas egaj, do la ĝirafoj havas „kolegojn”. Kaj ni ridis, pensante ke Josi ja havas kaj havos ne nur kolegojn, sed ankaŭ amikojn en la tuta mondo. Tio okazis, ĉar li estis bonkora, amikema, helpema, gastema, agema kaj precipe gaja. Josi aranĝis sola aŭ kune kun gekolegoj ĉiujn tutlandajn esperantistajn eventojn, kiujn mi partoprenis: landajn kunvenojn, ekskursojn kaj somerajn renkontiĝojn. Li havis naturan talenton pri instruado, tial li gvidis multajn kursojn por komencantoj kaj progresantoj. Li ankaŭ zorgis plibonigi niajn lingvokapablojn, kompilante por la kunvenoj vortludojn kaj vortŝercojn en E-o. (Fakte, eĉ la ŝerco kiun mi ripetis supre estas vortludo.) Li estis bonega amiko kaj bonega esperantisto, kiu multe mankos al la geamikoj kaj al la Movado.

*Luiza CAROL (Israelo)*

### **Ottó HASZPRA (1928-2012) Hungario**

Honora Membro de UEA, prof. d-ro Ottó HASZPRA, forpasis la 18-an de aprilo en Budapeŝto, kie li naskiĝis la 11-an de septembro 1928. Haszpra estis emerita profesoro de la hidrokonstrua katedro de la Teknika Universitato de Budapeŝto, fakulo de UN, kaj ekde 2004 membro de la Hungara Akademio de Sciencoj.



HASZPRA lernis E-on en 1958. Li estis membro de Hungaria E-Asocio ekde 1962 kaj servis ĝin kiel komitatano (1965-1990), estrarano (1977-1990) kaj vicprezidanto (1981-1990). Li estis fakdelegito pri inĝenierado ekde 1972, komitatano de UEA (1980-1990), kaj estrarano de UEA pri faka agado (1986-1989). Haszpra estis redaktoro de Sciencaj komunikaĵoj (1974-1979) kaj gvidanto de Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto (1981-1985). En la 68-a UK en Budapeŝto (1983) li estis rektoro de la Internacia Kongresa Universitato. Li membris en AIS ekde 1986, en Internacia Scienca Akademio Comenius ekde 1997 kaj en Akademio de E-o ekde 2004. Ottó HASZPRA aperigis multajn sciencajn kaj popularsciencajn artikolojn en E-o kaj ofte prelegis. Li kunlaboris por la 6-lingva Geodezia fakterminaro (1976-1981) kaj por Hungara-Esperanta meza vortaro (1996). En 2000 aperis lia ampleksa E-lernolibro por hungaroj. Krom la historia trarigardo Esperanto – lingvo de natursciencoj kaj tekniko 1887-1986 (1988), Haszpra aŭtoris i.a. la studojn La vera kosto de la multlingveco (1978), Liter-ofteco en Esperantaj tekstoj (2001), La natura ŝarĝo de la lingvolernado kaj ties radikala malpliigo (2002), kaj Egalrajteco kaj ekonomieco en la internaciaj rilatoj (2005).

*Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 452, 2012-04-24*

### **Eŭgeno S. PEREVERTAJLO (1938-2012) – Uzbekio**

La Azia E-movado suferis ege severan baton kaj neanstataŭigeblan perdon. La 27-an de februaro 2012 en Taŝkento forpasis la elstara uzbekia e-isto, brila E-pedagogo, dojeno de mezazia E-movado Eŭgeno S. PEREVERTAJLO.

Eble ne hazarde liaj inicialoj ESP simbolis ĝuste E-on. Konatiĝinte kun la Lingvo Internacia en 1957, la tutan vivon li restis fidela kaj fervora E-propagandisto, talenta kaj senlaca E-instruisto... Siatempe li esperantigis la romaneton *Timur kaj lia taĉmento* de Arkadij GAJDAR (HEA, 1982), publikigis 11-lingvan E-kurson





en la revuo *Sovetskij Uzbekistan* (1988-1990), verkis kaj eldonis du originalajn lernolibrojn *Invito al Esperanto* (internacie uzebla ABC-libro) kaj *Lernolibro kun ekzercoj* (novstila lernilo por plenkreskuloj)... En 1962 – komisiite de leningradaj e-istoj – ESP serĉis en Turkmenio la arkivon de la konata blinda verkisto Vasilij EROŜENKO. Eŭgeno S. PEREVERTAJLO estis neordinara homo, manlaboristo kaj samtempe intelektulo, vaste konata kaj respektata movadano, multjara UEA-delegito en Taŝkento, afabla, bonkora kaj helpema gastiganto de Pasporta Servo kaj Servas Internacia. Estingiĝis la mirinda vivo, kiu dum pli ol duonjarcento lumis en Esperantujo kaj sindoneme plantis E-semojn en la korojn de sennombraj adeptoj de la internacia lingvo. Ve, kun lia forpaso ŝajne foriris la tuta epoko de veteranaj aktivuloj, esperantistiĝintaj en nia regiono fine de la 1950-aj jaroj... Ni ne forgesos vin, kara ESP! Funebre kaj kondolence, nome de uzbekiaj esperantistoj

Anatoli IONESOV

*NdlR: La nekrologon pri Eŭgeno S. PEREVERTAJLO, la tri portreto-fotojn, kaj la du dorskovrilajn fotojn ni ricevis de edukado.net. Dankon!*

## Informoj pri ILEI

### Laborkomisionoj

**Ekzamena:** Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (viceprez.), Reza Torabi (sekretario), Karine Arakelian, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Tiekō Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

**Kontrolo:** Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot.

**Lerneja:** Julián Hernández (gvid.), Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tiekō Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

**Regulara:** Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill).

**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: Radojica Petroviĉ).

**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Aida Ĉiĝkaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petroviĉ, Kristin Tytgat.

### Kunlaborantaj institucioj

**EEU:** *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi).

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, [info@ikso.net](mailto:info@ikso.net).  
Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj  
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.  
Retadreso: [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).

**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, [zsafia.korody@esperanto.de](mailto:zsafia.korody@esperanto.de).

**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Stefan MacGill**.

**TEJO** (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidéliusz**.

**UEA**: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, [www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto kaj A-komitato de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

**UN** (Unuiĝintaj Nacioj): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, R. Glossop, L. Biró**.

**UNESKO** (en neformalaj rilatoj): Rezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, [francois.lojacomo@wanadoo.fr](mailto:francois.lojacomo@wanadoo.fr); **Monique Arnaud**, Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, [monique.arnaud@aliceadsl.fr](mailto:monique.arnaud@aliceadsl.fr); **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

## Membreco kaj pagado por aliaj servoj

**Membreco kostas 20 € en A-landoj** (laŭ UEA-difino) **kaj 10 € en B-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. **Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 10 € por la A-landoj kaj 5 € por la B-landoj**. Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Julija BATRAKOVA, p/a Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, <[persiko@mail.ru](mailto:persiko@mail.ru)>.

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

\* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

\* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldone de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*), pike-b (projekto *Interkulturo*).

\* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

\* Simpla abono de IPR sen membreco: 20 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostonj de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

## Redakciaj informoj

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <[jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com)>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <[moerbeekr@gmail.com](mailto:moerbeekr@gmail.com)>.

**La nunan numeron ni sendis al la presejo 11 majo 2012,**  
**redaktfino por la sekva numero 15 aŭgusto 2012.**

*Dorskovrile supre*: Arko (estro de ILEI-CN) (meze) kun KER-diplomitoj el Hajnano: WEN Qunyan (dekstre) kaj LIU DongMei (Lunkaŝa); *malsupre*: franca familia Jannick HUET, Bert SCHUMANN kaj ilia filino Gretel – kun KER-atestiloj.



*De maldekstre: Jehoshua Tilleman, Jinon Meiri, Filomena Canzano, Josi Šemer, Luiza Carol, Shaul Shemer dum la UK en Bjalistoko 2009. (vd p.38)*



*E-kurso en Kunming prepare al nia 45-a Konferenco (vd p.35)*

